POLSKI ZWIĄZEK ESPERANTYSTÓW
Oddział Wojewódzki
ul. Strasznewskiego 29, tel. 22-87-71
skr. poczt. 519, 30-960 Kraków

1985 februaro
78a jaro
n-ro 950 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Pilgrimi al Varsovio por la Jubileo en 1987

Vi trovos

en ĉi tiu numero la ĉiujarajn erojn pri la stato de la membraro de UEA kaj pri la libroj plej venditaj dum la pasinta jaro. Troviĝas ankaŭ novaĵo. La redaktoro jam de kelka tempo meditas pri la formo de rubriko kun simplaj proponoj kaj konsiloj kiel unuopuloj aŭ klubo povus aktivi. Tion petis kelkaj legantoj. Do, kun aparta danko al Harri Melasniemi el Finnlando pro la unua fasko da ideoj, kiujn li delonge praktikas, ni ĉi-numere lanĉas tian rubrikon sub "Kiel aktivi". Kiel la rubriko evoluos kaj kiel ofte ĝi aperos, dependos plejparte de la ricevo de taŭga konciza materialo. Ĉu via agadmaniero estas diskoniginda?

Enhavo

21 Estrara kunsido: Ni kongresos en Varsovio en 1987 (Geoffrey Sutton); Por universitata ligilo (Germain Pirlot)
23 Informado: Bengala televido stimulis intereson; Idealtempa tv-elsendo
24 Libromerkato: Kio plej vendiĝis; Faka agado: Kunlaboro por la medio.
25 Bengtsson akceptis la estraron de SEF.
26 Jubileoj: Loka klubo de Zamenhof festis sian 80-jariĝon (Zofia Banet-Fornalowa); Kiel aktivi: Du praktikaj ideoj.
27 Centro de Esploro kaj Dokumentado: Tria konferenco en Novjorko (Claude Nourmont)
28 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 70a Universala Kongreso)
30 Recenzoj: *Mi malamas...* de Hajasi Ken (G. Berveling); *Sur kampo granita* de István Nemere (Xu Xiaoya); *La vivo de Sándor Kőrösi Csoma* de Ferenc Szilágyi/E. Fenyvesi (Jiang Hongzhang); *Lokis* de Prosper Mérimée/M. Delcourt kaj *La nobela burĝo* de Molière/R. Levin (M. Haase); *La centa simio* de Ken Keyes Jr./J. Naber-Keller (D. Witscher); *La morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko* de Jorge Amado/G. Pádua (R. Cash); *La morta suito* de Miyamoto Masao (U. Lins)
34 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
35 TEJO-paĝo: Internacia Junulara Jaro: Ĉu ĝi estas por la kvarmiliarda homo?; Internacia seminario.
36 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
38 Oficiala informilo de la CO de UEA
39 La membraro de UEA en 1984; Nekrologoj
40 Anoncetoj

La kovrilo

montras parton de la enirejo al Palaco de Kulturo kaj Scienco en la pola ĉefurbo. Tie okazos la 72a Universala kongreso, kiam Internacia Lingvo komencos sian duan jarcenton. La dato de la Kongreso estas ideala. Ĝia dua tago estos la 26a de julio. Je tiu dato aperis en 1887 la unua lernolibro de Esperanto. Kaj same konvena kiel la tempopunkto, la naskiĝurbo de Esperanto estas la memkomprenebla loko por tiu jubilea festo. Cent jaroj donas multe da spertoj por konsideri fronte al ĉiam pli promesplena estonteco.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Gravendijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 950 (2), februari 1985. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Ni kongresos en Varsovio en 1987

La Estraro de UEA kunsidis de la 5a ĝis la 7a de januaro en Roterdamo. Ĉi-sube ni mencias nur la plej gravajn informojn el la tri plenaj tagoj de diskutoj kaj decidoj.

Ĉi-foje okazis speciala malfermo al la laboro, ĉar la nova alo de la Domo de UEA estis tiel preta, ke la estraranoj povis ĉeesti malgrandan inaŭguran ceremonion, kune kun oficistoj kaj la konstruisto, s-ro Linssen. Tamen, kiam la alo estos plene preta kaj ekipita, okazos oficiala malfermo, kaj ni prezentos la novan konstruaĵon ankaŭ en la revuo.

El la naŭ estraranoj nur Baldur Ragnarsson ne povis partopreni pro malsano. Ian Jackson, prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ne povis ĉeesti pro samtempa estrarkunsido de TEJO aliloke. Parton de la kunsido ĉeestis Hermann Schmid, sekretario de la Loka Kongresa Komitato de la ĉi-jara Universala Kongreso en Aŭgsburgo. Kun kontento oni notis, ke la Prezidanto de Federacia Respubliko Germanio, d-ro von Weizsäcker, akceptis esti la Alta Protektanto de la Kongreso.

D-ro Jerzy Leyk kaj Lech Kosieniak, prezidanto kaj vicprezidanto de Pola Esperanto-Asocio, venis raporti al la Estraro pri la planoj por Universala Kongreso en Varsovio. La Estraro krome ricevis tiuteman raporton de Simo Milojević, kiu vizitis Varsovion en decembro. Surbaze de tiuj kontentigaj raportoj, la Estraro unuanime decidis, ke la 72a Universala Kongreso de Esperanto definitive okazos en Varsovio en la Jubilea Jaro 1987. Supozeble ĉiu unuopa esperantisto komprenas kial necesas, ke la altpunkto de la jubilea celebrado okazu ĝuste en la naskiĝurbo de Esperanto. Oni klarigis, ke la kongresejo – la sama, tre taŭga kiel por la 44a Universala Kongreso en 1959 – ne povos teni pli ol kvin mil personojn. Oni antaŭvidas okazigi la Inaŭguron je sabato. La posta tago, dimanĉo la 26a de julio – precize la centa datreveno de la aperdato de la Unua Libro, estos festa tago malferma al la publiko kaj nekongresanaj polaj esperantistoj. Ĝi estos kvazaŭ interkona tago, popola festo, kiam la Esperanto-movado prezentu sin en kaj ekster la kongresejo. Paralele kun la UK, Pola Esperanto-Asocio proponas aranĝi apartan plursesian sciencan konferencon, kiu traktos la centjaran historion de Esperanto el plej diversaj vidpunktoj. Oni aparte atentos, ke estu multaj eblecoj ekskursi al Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof. Eble ankaŭ la Komitato kunsidos tie antaŭ la Kongreso.

Rilate alian Universalan Kongreson, nome la venontjaran en Pekino, oni fiksis novajn favorajn kotizojn (vd. sur anoncopaĝo fine de ĉi tiu numero) kaj aprobis la konsiston de ties Loka Kongresa Komitato. Oni diskutis pri la kongresa temo. Ni povos anonci la definitivan vortumon de la temo post la februara vizito de la ĝenerala direktoro al Pekino. La Estraro principe deziras okazigi apartan forumon en Eŭropo por tiuj multaj eŭropaj esperantistoj, kiuj ne povos entrepreni la multekostan vojaĝon al Azio. La

De dekstre: Grégoire Maertens (prezidanto de UEA), Roland Lindblom (estrarano pri kongresoj), Flóra Szabó-Felső (ĝenerala sekretario), Petâr Todorov (estrarano pri faka agado) kaj Humphrey Tonkin (vic-prezidanto de UEA) okaze de la malfermo de la finkonstruata alo dc la Domo de UEA.

Neĝan bapton tuj spertis la nova alo de la CO.

proponon, ke tiu forumo okazu en Nederlando, oni ankoraŭ esploras.

La Estraro diskutis ankaŭ la preparlaborojn, faritajn de invitintoj de Universalaj Kongresoj post 1987, sed ne faris decidojn tiurilate.

Koncerne la administradon, multe da tempo oni dediĉis cele al pli efika funkciigo kaj kunordigo de la laboroj de ĉiuj oficejoj de UEA. La ĝenerala direktoro kaj la direktoroj de la aliaj oficejoj estonte renkontiĝos pli ofte, por prepari la glatan kunlaboradon. Simo Milojević iris viziti la budapeŝtan oficejon de UEA – Scienca Eldona Centro – en la fino de januaro, por trakti ĝiajn problemojn. La Estraro antaŭvidas, ke la oficejo en Novjorko kostos malpli en la nuna jaro. Oni tamen ankoraŭ ne estas kontenta pri ĝia influo ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

Peza punkto en la tagordo estis la financoj de la Asocio. Kontentiga estis la rekorda nombro de la Aligitaj Membroj en 1984 (vd. aliloke en ĉi tiu numero la membrostatistikon). Ankaŭ la fondaĵoj Grabowski kaj Canuto kontentige evoluis. Aliflanke, la provizora finkalkulo de la spezoj por 1984 donas multajn zorgojn, ĉar oni antaŭvidas signifan negativan saldon.

Anstataŭ la siatempa propono restrukturi la kotizsistemon, la Estraro proponos al la Komitato novan malaltan kotizon, kiu estos proksimume unu triono de MJ-kotizo. Kontraŭ tiu individua kotizo, kiu validus eksperimente dum tri jaroj, la membro ricevos depresaĵon de la unua cento da paĝoj el la Jarlibro. Per tiu propono la Estraro volas ligi al la Asocio kaj al la movado ĝenerale kiel eble plej multajn esperantistojn sojle de la Centjara Jubileo.

Sub planado oni diskutis plejparte preparojn por la Jubilea Jaro. André Staes plugvidos la jubilean oficejon en Antverpeno ĝis la Kongreso en Aŭgsburgo, kiam oni rekonsideros la situacion pro la antaŭvidita intensiĝanta laboro. Rilate la Internacian Patronan Komitaton, UEA baldaŭ difinos la kriteriojn kaj principojn, laŭ kiuj oni juĝos la taŭgecon de proponitaj nomoj. Pro la tre variaj sociaj situacioj tra la mondo necesos detalaj konsiliĝoj inter ĉiu landa asocio kaj UEA pri la plej taŭga maniero aliri la proponitojn. En la venontaj monatoj aperos en la revuo detala prezento pri ĉiuj aspektoj de la agado de UEA kaj ĝiaj landaj asocioj por la Jubilea Jaro.

Sur la eldona kampo la Estraro represigos *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, kiu baldaŭ elĉerpiĝos. Ĝi eniros la serion Jubilea Kolekto de UEA. Lige kun tio, oni faris tre atentindan decidon: proponi al landaj asocioj de landoj, kie la verko normale ne povas multe penetri, ke ili antaŭmendu kvanton kontraŭ produktokostoj. Tio helpos al multe pli da esperantistoj en evolulandoj kaj landoj kun transpagaj problemoj akiri la verkon. Tiun decidon oni intencas apliki ankaŭ por aliaj gravaj verkoj eldonotaj de UEA.

La venonta estrara kunsido okazos de la 20a ĝis la 22a de aprilo en Roterdamo.

Geoffrey Sutton

Por universitata ligilo

Nun kiam la Esperanto-instruado tiel bonege disvolviĝas en superaj lernejoj (vd. la rubrikon "Instruado" sub "Fake"), oni sentas la mankon de ligilo inter la kursgvidantoj por interŝanĝi informojn pri programoj, metodiko, instruiloj ks.

Sub la gvidado de prof. Emmanuel Companys, grupo de universitato en Parizo pretas okupiĝi pri la presado kaj dissendado de modesta bulteno, kiu aperus trifoje jare kaj kiun ricevus ĉiu gvidanto de Esperanto-kurso en universitatnivela instituto.

Kiu pretas transpreni la taskon de redaktanto, t.e. arigi artikolojn kaj pretigi ilin ĝuste enpaĝigitajn? Pri via preteco kunlabori, ĉu por verki artikolojn, ĉu por roli kiel redaktanto, bonvolu informi s-ron Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/B.3, B-8400 Oostende, Belgio, aŭ rekte kontakti prof-on E. Companys, Institut de Linguistique Appliquée et Didactique des Langues, Université de Paris VIII-Vincennes, 2 rue de la Liberté, F-93526 Saint-Denis Cédex 02, Francio.

Germain Pirlot

Bengala televido stimulis intereson

Malofta okazaĵo en Hinda Unio estas televida programo pri Esperanto. La loka televida stacio de Kalkato, en Bengalio, elsendis 31-minutan programon en la vespero de la 15a de oktobro. La programo komenciĝis per kanto de la mondfama bengala verkisto Rabindranath Tagor (1861-1941), esperantigita de Syam Sundar Pal kaj prezentita de s-ino Aditi Sengupto, kaj finiĝis per sceno el *Malsata ŝtono*, de la sama verkisto, tradukita de Lakshmiswar Sinha kaj la unua libro, kiu aperis en la prestiĝa serio Oriento-Okcidento (1961).

En la programo partoprenis ankaŭ prof. Pranabesh Sinha Roy, eksestro de la fako por lingvistiko kaj kompara filologio en Kalkata Universitato, Syam Sundar Pal, sekretario de Federacio Esperanto de Bharato (FEB), Dipok Bhattacharyya, Dipankar Mazumdar kaj S.K. Biswas.

Preskaŭ ĉiu ĵurnalo de Kalkato recenzis la programon. La anglalingva ĵurnalo *The Sunday Stateman* (244 mil ekz.) de la 21a de oktobro skribis i.a.: "Estis agrabla surprizo lerni pri la granda intereso de la mondo pri la kultivo de Esperanto. Ĝia uzo estis admirinde montrita... Kvankam la lingvo estas sinteza, la bonega deklamado de la vortoj elvokis ĉiujn humorojn."

Tiel granda estis la rikolto de intereso, ke FEB-Kalkato ne havis sufiĉe da lokoj por ĉiuj en sia klasĉambro.

De maldekstre: Dipankar Mazumdar, S.K. Biswas, Dipok Bhattacharyya, Syam Sundar Pal (sek. de FEB), prof. Pranabesh Sinha Roy, d-ro Pabitra Sarkar (prezentisto) kaj Pankaj Saha (reĝisoro).

Idealtempa tv-elsendo

La dua nederlandlingva kanalo de la belga televido, BRT2, la 22an de januaro elsendis 10-minutan programeron pri Esperanto. Ĝi estis komence de la populara diskutprogramo "Steek-er-wat-van-op-show" (Lernu ion el ĝi), en la ideala elsendotempo – tuj post la oka vespere. Intervjuiĝis Grégoire Maertens, prezidanto de UEA, kaj Kristin Tytgat, estrarino pri junularo de Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Al la prezidanto de UEA oni demandis pri la historio kaj nuna disvastiĝo de la lingvo. Informoj pri la baldaŭa jubileo ĉefrolis en liaj respondoj. Reage al la rekta demando "Ĉu viaj esperoj pri la lingvo ne fiaskis?", li lerte aludis la kreskantan multlingvecon en Eŭropa Komunumo por fini per la rebato: "Provu sencohave ligi la popolojn de Eŭropo per nur etnaj lingvoj – tie vere kuŝas la fiasko!"

Kristin Tytgat havis la taskon respondi demandojn pri la movado en Flandrio kaj sukcesis paki multajn informojn en la limigitan tempon. Klarigo pri la Pasporta Servo de TEJO rolis en ŝia respondo pri la praktika utilo de Esperanto. Tie enviciĝis ankaŭ filmeto, farita dum la Universala Kongreso en Antverpeno en 1982. La komentario estis en simpla kaj klara Esperanto, por ke la publiko aŭdu la parolatan lingvon.

Dufoje aperis sur la ekrano la adreso de la sidejo de FEL, de kie spektintoj povas ricevi informojn kaj aliĝilon por kurso. Ene de unu semajno FEL ricevis pli ol 200 reagojn. La programo estis ripete elsendita komence de februaro.

Pri la televidelsendo kaj pri Esperanto aperis ankaŭ tutpaĝa artikolo en la fama revuo "TV-Express", kiu kaŭzis eĉ pli grandan eĥon: 400 petis Esperanto-kurson.

Kio pleje vendiĝis

Jen ĉi-sube nia listo de la libroj, kiuj pleje vendiĝis tra la Libroservo de UEA dum la jaro 1984:

1.	*Faktoj kaj fantazioj* (Boulton)	36,00
2.	*Kiuj semas plorante...* (Tófalvi/Kníchal)	15,00
3.	*La lingva esenco de Esperanto* (Atanasov)	27,00
4.	*Esperanta antologio* (red. Auld)	60,00
5.	*Esperanto aŭtodidakte* (Childs-Mee)	24,00
6.	*Plena analiza gramatiko* (Kalocsay/ Waringhien)	48,00
7.	*Ĉu vi konas la teron?* (Dudich)	12,00
8.	*Elpafu la sagon* (Sekelj)	27,00
9.	*Praktika bildvortaro de Esperanto*	14,40
10.	*Vivo de ... Zamenhof en bildoj* (Thien)	30,00
11.	*Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (Wells)	12,00
12.	*Karlo* (Privat)	2,10
13.	*Paŝoj al plena posedo* (Auld)	21,00
14.	*Gerda malaperis!* (Piron)	3,90
15.	*Distributed Language Translation* (Witkam)	57,50
16.	*Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo* (Sekelj)	12,00
17.	*Diccionario de bolsillo* (Paluzie-Borrell)	6,60
18.	*Esperanto and English Dictionary* (Wells)	22,20
19.	*Rakontoj pri Afanti*	3,00
20.	*Plena ilustrita vortaro* (Waringhien)	138,00

Sen ajna dubo la plej furora libro de 1984 estis la legolibro por progresintoj *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton, kvankam ĝi aperis nur meze en la jaro. Ĝis la 31a de decembro vendiĝis 906 ekzempleroj. Tio superas per pli ol la duoblo la vendokvanton eĉ de la due plej vendita libro, la premiita romano *Kiuj semas plorante...* de Éva Tófalvi kaj Oldřich Kníchal – iom malpli ol 400 ekzemplerojn.

Novaj verkoj kompreneble tendencas alti en la statistiko, sed estas notinde, ke bazaj verkoj kiel *Plena analiza gramatiko* (1980), *Praktika bildvortaro* (1979) kaj *Plena ilustrita vortaro* (1970) daŭre vendiĝas kontentige. La populara lernolibro *Esperanto aŭtodidakte; Saluton!* (1983), kiu okupas la kvinan lokon, estas plia pruvo pri la vereco de la konstato, ke plej vendiĝas bonaj vortaroj kaj lernolibroj. Estos tre instrue sekvi la pluan vendadon de la scienca verko *Ĉu vi konas la teron?* Des pli interese, ĉar UEA eldonos en la ne tro fora estonteco bazan verkon pri la veterscienco: *La vetero kaj klimato de la mondo*.

Dum la jaro estis tre granda intereso pri la libro *Distributed Language Translation* (Distribuita lingvotraduktado) pri la projekto de duon-aŭtomata tradukado de la nederlanda firmao BSO (vd. *Esperanto*, p. 5, 1984).

Eble ne estas tro surprize, ke UEA okupas interalie la kvar unuajn lokojn en la statistiko. Kvankam ni havas la plej adekvatan superrigardon al niaj propraj eldonaĵoj, la Libroservo de UEA estas ankaŭ la plej granda vendanto de ĉiuj Esperantaj libroj, do ni havas la plej grandan eblecon esti objektivaj pri la vendado ankaŭ de libroj eldonitaj de aliaj.

Interesa fakto por noti estas ankaŭ la rekorda sumo de la libroservaj vendoj ĉe UEA en la pasinta jaro, kiam la vendoj sumiĝis je pli ol 280 000 guldenoj (kompare kun 173 000 en 1983 kaj 194 000 en 1982). Tamen, tiel altan vendosumon portis unuavice la fakto, ke UEA fariĝis aktiva eldonanto, kaj ne ia ĝenerala kresko de la aĉetemo ĉe la esperantistaro.

Kunlaboro por la medio

En junio 1984 ministroj pri vivmediaj aferoj kaj koncernaj fakuloj el ĉirkaŭ 30 ŝtatoj renkontiĝis en Munkeno, FR Germanio, por internacia konferenco pri la vivmedio. Sekve de tio, multaj organizaĵoj por protektado de la naturo kaj vivmedio interkonsentis pri propraj internaciaj konferencoj. En julio 1984 okazis en Wiesenfelden, FR Germanio, la unua seminario pri arbarmortado kaj acidigo de akvejoj. Sed tiun konferencon partoprenis preskaŭ nur reprezentantoj el okcidenta Eŭropo.

De la 30a de novembro ĝis la 2a de decembro Bund für Umwelt und Naturschutz (Ligo por la Vivmedio kaj Naturprotekto) de FR Germanio okazigis en la kastelo de Wiesenfelden en la bavara arbaro sian duan internacian seminarion. La celo de la seminario, kiu portis la devizon "Vivmedio ne havas limojn", estis ekkoni la vivmedion de unuopaj landoj, provi formuli komunan starpunkton kaj komuniki ĝin al naciaj registaroj aŭ al la publiko.

La seminarion partoprenis ĉirkaŭ 50 reprezentantoj de diversaj organizaĵoj, inter kiuj estis 13 esperantistoj el Ceĥoslovakio, Hungario, Italio kaj FR Germanio. Oni uzis preskaŭ nur la germanan kaj Esperanton kiel seminariajn lingvojn. Interpretis inter tiuj lingvoj prof. Hans-Dietrich Quednau, de la arbarscienca fako de Universitato de Munkeno, kaj s-ro J.A. Pachter, arbarinĝeniero. Inter la prelegantoj estis direktoro Vinogradov, kiel reprezentanto de Sovetunio, ano de la inform-oficejo de la soveta registaro, soveta reprezentanto ĉe kaj Unesko kaj Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrokulturo de UNO. La neesperantistajn partoprenantojn de la seminario favore impresis la bone funkcianta Esperanto-interpretado.

La rezolucio kaj la tekstoj de ĉiuj prelegoj haveblas de: Bund Naturschutz in Deutschland, Bildungswerk Schloss Wiesenfelden, D-8441 Wiesenfelden, FR Germanio. Oni eble eldonos Esperantan tradukon de la prelegaro, se estos sufiĉe da petantoj.

Bengtsson akceptis la estraron de SEF

La 30an de novembro pasintjare Ingemund Bengtsson, la prezidanto de la sveda parlamento, invitis la tutan estraron de Sveda Esperanto-Federacio (SEF) al neformala akcepto en la oficiala vilao de la parlamento, Bonniers Villa. Bengtsson volis konatiĝi kun ĉiuj gvidantoj de la federacio. Tio bele montras lian daŭran intereson pri la progreso de la Esperanto-movado. Li krome konfirmis, ke li ĉeestos la Svedan Esperanto-Kongreson, kiu okazos de la 16a ĝis la 19a de majo en Helsingborg, en suda Svedio.

Sur la foto supre dekstre, Ingemund Bengtsson donace ricevas de Roland Lindblom, prezidanto de SEF kaj estrarano de UEA, ekzempleron de pasintjare eldonita verko *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton.

Malsupre, Ingemund Bengtsson ĉe unu el siaj multaj labortabloj kaj (dekstre) ĉirkaŭata de la estraro de SEF: (de maldekstre) Åke Rohdin, Birger Viggen, Ingemar Nordin, Anita Lindblom, Kerstin Rohdin, Niklas Gustafsson (malantaŭe), Leif Gunnar Nordenstorm (la nova prezidanto de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo), Roland Lindblom kaj Märtha Andréasson. (Fotis Åke Rohdin, Karin Lindquist kaj Åke Lindblom.)

Loka klubo de Zamenhof festis sian 80-jariĝon

La 6a de decembro estis la 80a datreveno de la fondo de Varsovia Esperantista Societo, kies kunfondinto kaj unua prezidanto estis la iniciatinto de Esperanto mem.

De la ekesto de Esperanto la varsoviaj esperantistoj klopodis krei organizaĵon. Unu el tiuj provoj estis la fondo de grupo la 1-an de decembro 1893. La unuan kunvenon partoprenis kvin personoj: S. Goldberg, en kies loĝejo la kunveno okazis, Józef Waśniewski, A. Blumenthal (frato de Leo Belmont), J. Janowski kaj Wilhelm Róbin. Pri la okazaĵo raportis *La esperantisto* en tri sinsekvaj komunikoj komence de 1894. Bedaŭrinde malpermeso de la aŭtoritatoj ĉesigis la komencitan agadon.

En la jaro 1904, post persistaj klopodoj de d-ro Zamenhof, Antoni Grabowski, Leo Belmont (pseŭdonimo de Leopold Blumenthal), A.B. Brzostowski, Adam Zakrzewski k.a., oni sukcesis starigi la unuan Esperanto-organizaĵon en Varsovio. Tio okazis la 6an de decembro 1904, en la loĝejo de Antoni Grabowski, Hoża 40.

Varsovia Esperantista Societo (VES) ne estis tute memstara organizaĵo, sed filio de la Esperanto-societo "Espero" en Peterburgo. Oni tamen povas konsideri ĝian fondon mejloŝtono en la progreso de la Esperanto-movado en Varsovio kaj en Pollando entute. En la unua estraro estis Zamenhof, prezidanto, Grabowski, vicprezidanto kaj sekretario, kaj Brzostowski, estro de la sidejo kaj bibliotekisto. Pro la rusa revolucio la laboro ne povis komenciĝi ĝis la dua duono de 1906, kiam la prezidanto jam estis Grabowski, dum Zamenhof fariĝis la honora prezidanto. Grabowski restis la prezidanto ĝis sia morto en 1921.

La atingoj de VES estis kronitaj per ricevo de permeso krei memstaran Esperanto-organizaĵon por la tuta Pola Reĝlando – Pola Esperanto-Societo. Tio okazis la 16an de majo 1908, sed VES restis ĝia sidejo.

Per niaj festaj solenaĵoj, ni en VES deziris honori ne nur niajn grandajn antaŭulojn, sed ankaŭ profiti el la okazintaĵoj por informado en Varsovio. VES komencis la solenaĵojn je la 5a de decembro per malfermo de ekspozicio pri "80 jaroj de Esperanto-movado en Varsovio". Ĝi daŭris dek tagojn. La 7an de decembro la televido raportis pri ĝi dum kelkaj minutoj, kaj kelkaj gazetoj raportis. La kostojn de la ekspozicio, kiu troviĝis en la prestiĝa Internacia Libra kaj Gazetara Klubo, pagis la Urba Konsilantaro.

La 9an de decembro aperis artikolo pri VES en la ĉefurba informa kaj kultura revuo *Stolica* (Ĉefurbo), verkita de Zofia Banet-Fornalowa. La postan tagon alvenis el nia ĝemela Esperanto-klubo en Stokholmo tripersona delegacio por dum tuta semajno tre aktive partopreni ĉiujn erojn de nia festa programo.

La 11an de decembro okazis Esperanta deklamkonkurso sub la nomo "Antoni Grabowski". La sekva tago estis la kulmina punkto de la solenaĵoj. Post prelego pri la historio de VES kaj enmanigo de honora membreco de Pola Esperanto-Asocio al kelkaj varsoviaj aktivuloj, okazis koncerto kun abunda Esperanta kultura programo.

La 15an de decembro, la 125an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, niaj svedaj gastoj okazigis akcepton en nia klubejo.

La solenaĵoj finiĝis la 16an de decembro per kolektiĝo de varsoviaj kaj stokholmaj esperantistoj ĉe la tombo de Zamenhof.

Zofia Banet-Fornalowa

Du praktikaj ideoj

Harri Melasniemi, fakdelegito pri reklamado en Turku (Finnlando), donis al ni du ekzemplojn kiel oni povas facile kaj praktike agi por informi pri Esperanto per amaskomunikiloj.

Foto: Irja Melasniemi

Harri Melasniemi, en kies hejmo oni surbendigis la programon por "Miaj propraj diskoj", kaj redaktoro Matti Hara (dekstre). Tia estas la nuntempa tekniko: malgrandaj iloj, kiel etaj mikrofonoj sur la brusto.

La 9an de januaro en finna radio estis interesa, 50-minuta programo pri Esperanto. La programo apartenis al la multe aŭskultata serio "Miaj propraj diskoj". Ties redaktoro, Matti Hara, intervjuis Harri Melasniemi, kiu multflanke rakontis pri la nuna stato de la Esperanto-movado kaj la lingvo mem.

La programo komenciĝis per "Esperantomarŝo" kaj dum la elsendo oni aŭdis ankoraŭ ses aliajn Esperantajn muzikaĵojn. La programon oni ripetis la sekvan matenon.

Tiu speco de muzika programo ekzistas verŝajne en plimulto de landoj, kaj la redakcioj aktive bonvenigas interesajn sinproponojn.

Antaŭ kelkaj monatoj Melasniemi prezentis prelegon en finna radio kun la titolo "Pri kio Esperantaj gazetoj rakontas". Ankaŭ tiu kvaronhora programo estis ripetita. Ĝi apartenis al la vaste aŭskultata serio "La prelego de la semajno".

Sian duan praktikan ideon Melasniemi nomas "grava, guto-post-guta sistemo por informado". Kiel profesia redaktoro, li scias, ke estas grave, ke ĉiu Esperanto-asocio kaj -klubo abonu al la redaktejo de sia loka (aŭ landa) radio la revuon *Esperanto*. Ili kompreneble povas, laŭ monrimedoj, aboni ankaŭ aliajn Esperantajn gazetojn, sed plej volonte nur la ĉefajn, kiel ekzemple ankaŭ *Monato, Heroldo de Esperanto* aŭ *El popola Ĉinio*. La lasta pro ties kulture interesa enhavo.

Povas esti, ke iu kontraŭas, dirante, ke la redakcioj ne komprenos la enhavon kaj ne foliumos la gazetojn, sed tio estas eraro. Ĉiam iu rimarkas la gazetojn, kaj gravas, ke ili konatiĝu kun ilia ekzisto. Poste venos la informa rikolto.

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Tria konferenco en Novjorko

Jam tradicio fariĝis la jaraj konferencoj pri lingvo kaj komunikado. En Novjorko la 14an de decembro okazis la 3a konferenco organizita de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) kaj prizorgita de la novjorka oficejo de UEA.

Malfermis la konferencon s-ino Françoise Cestac, estro de la traduka servo de Unuiĝintaj Nacioj (UN).

Temis pri maratona kunveno: en unusola tago, dum tri sesioj, antaŭ sesdeko da partoprenantoj, specialistoj prezentis 13 referaĵojn, kiujn oni poste komentis per demandoj kaj respondoj. La referaĵoj estis ĉefe en la angla – nur unu estis en la franca. La partoprenantaro tamen estis tre internacia: parolis diverslandaj altrangaj oficistoj de UN, profesoroj el tri

Fotoj: C. Nourmont



Supre: S-ro B. Boeglin fermas la duan konferencan sesion. Sube: Partoprenantoj el pluraj kontinentoj.

usonaj universitatoj, tradukistoj kaj lingvistoj el Usono, Kanado kaj Eŭropo.

La ĉi-foja temo estis "Lingva planado je internacia nivelo" – vasta kaj iel dusenca temo, tiel ke la prelegoj rilatis al du interpretoj de ĝi: kiel plani lingvon unuflanke kaj kiel plani utiligon de lingvoj aliflanke.

Pluraj referaĵoj traktis terminologiajn problemojn, kiel ekzemple tiu de s-ino Marie-Josée Jastrab, franca terminologo ĉe UN. Ŝi parolis pri "La normigo de la terminologio de UN". Joseph Malone, profesoro de Barnard College, prezentis "Falsaj amikoj en internacia lingvoplanado", ĉefe pri la kaŝe plursignifaj vortoj.

Adnan Yusuf, estro de la araba tradukservo ĉe UN, klarigis la evoluon de la araba lingvo per prelego pri "Kreado kaj disvolvo de la araba lingvo ĉe UN".

Alian aspekton de la terminologiaj problemoj tre klare montris Alex Olde Kalter, lingvisto de la firmao Buro voor Systeemontwikkeling, kiu speciale venis el Utrecht, Nederlando. Li prezentis la nunan staton de la esplorado, kiu celas aŭtomatan traduksistemon pere de pontlingvo bazita sur Esperanto (vd. p.5 de *Esperanto*, 1985).

La lingvan politikon de diversaj organizaĵoj oni montris ĉefe en tri prelegoj: Jean-Claude Corbeil, sekretario de Internacia Centro pri Fundamenta kaj Aplika Lingvistiko en Montrealo traktis la temon „La lingva politiko de organizaĵo por internacia kunlaboro: Oficejo por Kultura kaj Teknika Kunlaboro

(ACCT)", montrante la ĉefrolon de la franca kiel ligilo en tiu organizaĵo. Humphrey Tonkin, rektoro de Ŝtata Universitata Kolegio de Novjorko en Potsdam kaj vicprezidanto de UEA, parolis pri "Lingvoplanado, planlingvoj kaj internaciaj organizoj", prezentante la historion de la proponoj uzi Esperanton en tiu medio. Brian Moon, reviziisto ĉe la traduka servo de Eŭropa Komunumo (EK) en Luksemburgo, priskribis la klopodojn konservi la plurlingvismon ĉe EK.



S-ro Yussef Mahmoud mezprelege pri la lingva trejnado ĉe UN.

Aliaj prezentoj rilatis al la problemoj pri varbado kaj trejnado de oficistoj por plenumi la multlingvajn bezonojn de internaciaj organizaĵoj. Yussef Mahmoud, oficisto ĉe UN, parolis pri la lingva trejnado en la kunteksto de lingvoplanado. Pierre Pelanne, ankaŭ oficisto ĉe UN, parolis pri la varbado de lingve kompetentaj oficistoj, kaj Bruce Boeglin, kiu trejnas la interpretistojn ĉe UN, verve montris kiel efike plani la interpretadon antaŭ konferenco. Pri la planado de lingvaj servoj en internaciaj aferoj same verve esprimis sin Eva Berry, prezidantino de la usona asocio de tradukistoj.

Okazis ankaŭ du aliaj prelegoj, ekster la du ĉefdirektoj de la temo. Roland Wesemaël, ŝtatsekretario en Kanado, prezentis la gestolingvan interpretadon, kaj Amri Wandel parolis pri la lingvo kaj simuloludoj.

Kiel kutime, la aranĝo finiĝis per akcepto okaze de la Zamenhofa Tago, kiu kunvenigis la partoprenantojn de la konferenco kaj la membrojn de la Esperanto-klubo de Novjorko.

Iu eventuale povus demandi kial UEA uzas sian energion por organizi preskaŭ tute anglalingvan aranĝon, kie Esperanto ludas ŝajne nur tre malgrandan rolon. Ni konsciu tamen, ke dank' al tia aranĝo UEA, pere de sia oficejo en Novjorko, tenas la rilatojn kun UN sur konkreta nivelo.

La aranĝo sukcese celis altigi la prestiĝon de CED kaj UEA ĉe UN. Mi ankaŭ aldonu, ke tiel ni donas okazon al aliaj homoj ol esperantistoj pripensi la problemaron de lingva neegaleco. Ni mem lernas vidi la problemojn laŭ la rigardo de aliaj, kaj same ili lernas de ni aŭdante pri aspektoj de la problemaro ne tiel konataj ekster niaj vicoj.

Ŝajnas do, ke estas tute dezirinde daŭrigi la konferencan serion, tamen serĉante novajn vojojn. La temo de la venonta konferenco devus esti pli specialigita, malpli nebula, tiel ke ĝi arigu novan gamon de specialistoj.

Claude Nourmont

Kongresa Komuniko

70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Aŭgsburgo (FR Germanio)
3-10 aŭgusto 1985
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Adreso de LKK: Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

Alta Protektanto: Ekde 1905 la plimulto de la Universalaj Kongresoj ĝuis la protekton de la ŝtestro de la kongreslando. Aŭgsburgo ne estos escepto. En sia letero al la prezidanto de UEA, la Prezidanto de FR Germanio, d-ro Richard von Weizsäcker, skribis: "Inter la sennombraj aranĝoj, kiuj okazos dum 1985 en la kadro de la dumiljara festo en Aŭgsburgo, la Universala Kongreso de Esperanto okupos eminentan lokon... Mi volonte prenas sur min la protekton de la Kongreso, por kiu mi deziras bonan kaj sukcesan disvolviĝon."

Honora Komitato: La konsisto de la Honora Komitato estas impona kaj prestiĝa subteno al la UK,

kiu fortigas la brilon de la Alta Protektanto. Inter la plurdeko da nomoj estas la prezidantoj de la federacia parlamento, d-ro Jenninger, kaj la provinca parlamento de Ŝvabio, s-ro Dörr; la federacia Ministro pri Eksteraj Aferoj, s-ro Hans Dietrich Genscher; federaciaj, provincaj kaj eŭropaj parlamentanoj; provincestro, ĉefurbestro kaj senatanoj; episkopo kaj dekano, rektoro de la universitato de Aŭgsburgo kaj aliaj. Oni ankoraŭ ne ricevis ĉiujn respondojn al la invitoj, sed la indiko estas, ke 80% de la invititoj akceptos kaj estos tre diversa komitato de eminentaj reprezentantoj de la politikaj, religiaj kaj alispecaj sociaj agadoj de la kongreslando.

Alvoko al artistoj: Okaze de la UK oni publike prezentos Esperanto-kulturon sur la urba placo de Aŭgsburgo kiel tri-horan posttagmezan spektaklon, parte por montri al la ekstero la internaciecon kaj diversecon de Esperanto kaj ĝia kulturo, parte por esprimi dankon al la urbo, kiu gastigas la UK.

Estos dezirinde elmontri la bunton kaj diversecon de popolaj kostumoj kiel okulfrapan parton de la spektaklo. Krome estas klare, ke la prezentado devos esti ĝenerale komprenebla aŭ ĝuebla ankaŭ por neesperantistoj, kvankam estos dulingva ceremoniestro.

Ĉiuj, kiuj aliĝas al la UK, estas petataj konsideri proponi sin por ĉi tiu festivalo. Oni antaŭvidas maksimuman longecon de dek minutoj por ĉiu unuopa ero. Sendu vian proponon al unu el la supraj adresoj.

Dua Bulteno: La Duan Bultenon oni dissendos al la aliĝintoj en la komenco de februaro. Ĝi celas esti komprenebla kaj facile uzebla ankaŭ por unuafoja kongresano. Ĝiaj 48 paĝoj entenas informojn pri la mendeblaj loĝado, ekskursoj, aliaj kongresoj, bankedo, Cseh-kursoj, Internaciaj Ekzamenoj, pri la Belartaj Konkursoj de UEA, FR Germanio, la kongresa temo, kongresaj perantoj kaj aliaj utilaj sciindaĵoj. Novaĵo estas la publikigo de provizora programskemo, por povi pli facile plani la mendadon de ekskursoj.

Turismo: Multaj kongresanoj ĉiujare profitas de la okazigo de la UK por ekskursi en la kongreslando. Jam en antaŭa komuniko ni informis pri la vastaj eblecoj ekskursi ne nur dum la kongresa semajno mem, sed en la oficialaj Antaŭkongreso kaj Postkongreso. Kiel menciite supre, la Dua Bulteno havas skemon de la disvolviĝo de la kongresa programo, kiu montras la ĉefajn programerojn kaj la horojn de la diversaj ekskursoj kun la celo eviti kelkajn konfliktojn, kiuj kutime ne estas antaŭvideblaj, kiam oni mendas ekskursojn.

Loĝado: Aldone al la informoj en la Dua Komuniko pri loĝado en Aŭgsburgo, estas notinde, ke la



mendilo por loĝado ĉi-jare estas sendebla rekte al la Loĝiga Servo sen antaŭpago. La urba turisma oficejo sendos al la mendinto dulingvan konfirmilon, kiun oni portu al la loĝejo mem. Pago okazos surloke, rekte al la hotelestro. LKK petos peradkotizon de po 3 GM en la kongresejo.

Kotizoj kaj kategorioj: Ekde nun ĝis la 14a de majo validas la dua kotizperiodo, dum kiu la kotizoj estas jenaj: Kat. 1 (ne membro de UEA) 188 gld., Kat. 2 (individua membro de UEA) 156 gld., Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA) 125 gld., Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ja estas membro de UEA) 94 gld.

Ni atentigas, ke Simpla Abonanto (SA) de la revuo *Esperanto* ne estas membro de UEA. Krome, tiuj, kiuj aliĝas laŭ kat. 1 ne ricevas la revuon dum la kongresa jaro, kiel okazis ĝis 1983.

Statistiko: Dum la finaj tagoj de la pasinta jaro venis al la CO tiel grandega lavango da aliĝiloj, ke ne eblas doni precizan laŭlandan analizon. Necesos semajnoj por trakti ĉiujn, ĉar en kelkaj tagoj la nombro de la aliĝoj duobliĝis! Kvankam ni bedaŭras, ke kelkaj aliĝintoj devos atendi iom pli longe, antaŭ ol ricevi sian konfirmilon, ni ĝojas povi anonci, ke la nombro de la aliĝoj en la mezo de januaro estis ĉirkaŭ mil cent.

Kvin klarstilaj rakontoj

Mi malamas..., Hajasi Ken (1933). Kioto: L' omnibuso, 1983. 71p. Ilus. 18cm. Prezo: 13,20 gld.

Postparole ete klarigas la aŭtoro la ekeston de la verketo: origine ja iom hezite, li kontribuis al la periodaĵo *L' omnibuso* (bedaŭrinde malaperinta); kaj nun la samnoma eldonejo regalas nin per ĉi tiu ĉarmaspekta libreto.

Kvin rakontojn ĝi enhavas: nur bedaŭre, ke ne pli... Memoraĵo el milittempo, pro la kreskanta tempa distanco, iom groteskiĝis, miaopinie. Malgraŭ funda seriozeco, grimacige ĝi etosas.

La dua ero estas miaŝate kulmino: se neniam ankoraŭ vi interesiĝis pri la nuna stadio de la evoluo de la homaro, post legado de tio ĉi, nepre vi ekmeditos pri la estonteco; samtempe – kaj jen grava laŭdo por la verkista majstreco! – ĝi estas tiel tenere rakontita... Ankaŭ la ceteraj estas tre legindaj; ŝokas la lasta, laste.

Kion diri pri la lingvaĵo kaj stilo? Nu, nemulte: maloftas preseraroj, la frazoj fluas agrable, nur ie-tie eta stumblo. Mi notis nur du ekzemplojn: sur paĝo 30 *malgraŭ* prefere estu "kvankam": "Sed mi, kvankam nur unu homo en la kosmo,.." La nura ĝeno lingva por mi estis la vorto *ovri* por "malfermi"; kvankam ja trovebla en *Plena ilustrita vortaro*, miaopinie ĝi estas plene superflua. Kaj sur paĝo 9 ĝi signifas eĉ "malfermiĝi"!

Ankaŭ ĉi tiun libreton ornamas belegaj trafaj ilustraĵoj, kiel jam ĉe antaŭaj titoloj de *L' omnibuso*. Sed mankas indiko pri la artisto: ĉu s-ro Saito Eizo refoje desegnis? Gratulon.

Entute rekomendinda ankaŭ por ne jam tre spertaj esperantistoj: stile klara, enhave valora verko.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Profundaj vortpentroj

Sur kampo granita, István Nemere (1944). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 127p. 20cm. ISBN 963 571 120 9. Prezo: 15,00 gld.

Pro la milito naiva junulo iĝis krimulo, bonaj homoj mortis, ĉarma infano fariĝis preskaŭ idioto... István Nemere klarigas tiun profundan temon per intrigo kun malmultaj roluloj.

La ĉefrolulo de *Sur kampo granita*, Martin, estis viktimo de la milito. En la Dua Mondmilito li havis 24 jarojn, rekte el la universitato oni veturigis lin al la fronto. En itala monta vilaĝo, Lavello, li ordonis mortpafi ses vilaĝanojn, kiel leŭtenanto de la germana armeo. Post la milito li veturis al Svislando, kie li akiris ŝtatanecon kaj laboris ĉe la Ruĝa Kruco.

Lia psikologio kaj vivdanĝera agado por la Ruĝa Kruco pruvas, ke li volis kompensi sian kulpon, sed oni ne povas ŝanĝi okazintaĵojn. Post 24 jaroj la gazetaro denuncas lin, do li iras al Lavello, por ke la kamparanoj lin komprenu. La sorto de Martin diras, ke sen la milito li ne fariĝus militkrimulo.

Ankaŭ ses familianoj de Giuseppe Lombardi estis viktimoj de la milito. Lia familio kaŝis vunditan partizanon. En ĝi estis tri infanoj. "Kiu povas scii, kion ili... faris antaŭ kelkaj minutoj,..." Martin kruele ordonis mortpafi ilin.

La aŭtoro tre atente vortpentras la psikologion; la memoro estas la ĉefa rimedo. Per la pejzaĝo li rimarkigas kaj metaforigas la solecan kaj teruran koron de la ĉefrolulo. La dialogo inter Martin kaj la vilaĝanoj sukcese montras la karakterojn de la personoj. La lingvaĵo de Nemere estas flua, bela, komprenebla kaj kolora, precipe en la vortpentroj pri la psikologio de Martin, pri la milito, pri la laboro por la Ruĝa Kruco kaj pri la pejzaĝoj, kvazaŭ la leganto admirus kelkajn profundajn kaj tristajn pentraĵojn. Sed oni sentas, ke la romano estas nekompleta: la memoroj estas tro multaj, la verko ŝajnas monotona

kaj la unuiĝo inter la intrigo kaj la memoroj estas nenatura, malsupera.

Bonuloj malamas la militon. *Sur kampo granita* profunde traktas la temon. Post tralego de la romano oni volas malhelpi la militon.

Xu Xiaoya (Ĉinio)

Kiel fondiĝis la tibetologio

La vivo de Sándor Kőrösi Csoma, Ferenc Szilágyi. El la hungara trad. Ervin Fenyvesi. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 151p. Ilus. 20cm. ISBN 963 571 139 5. Prezo: 15,00 gld.

Per abundo da aŭtentikaj dokumentoj kaj interesaj bildoj, tiu ĉi biografio rimarkeble superas ĉiujn aliajn pri la sama temo kaj fidele kondukas la legantojn sur la spuro de la hungara scienculo Sándor Kőrösi Csoma, ĝis la monumento super lia tombo apud Qomolangma, la plej alta monto de la mondo, ĝis la konvinkaj vortoj ĉe la librofino: "En sia lando la reĝo estas estimata, sed la scienculon oni estimas tra la tuta mondo!" La aŭtoro tute prudente ŝparis siajn proprajn komentariajn vortojn kaj prezentas nur krudajn faktojn, sed ĝuste tiuj faktoj kunligiĝis en pitoreskan tuton, kiu neniom paliĝas antaŭ intrigoplenaj romanoj kaj kortuŝaj epopeoj.

Verdire, Sándor Kőrösi Csoma (1784-1842) apartenas ne nur al Hungario, sed al la tuta mondo. En la lasta aprilo ankaŭ en Pekino okazis kunveno por memorigi la ducentan datrevenon de lia naskiĝo. Komence de la 19a jarcento, por esplori en fora Azio la originon de la hungaroj, li ekiris sola el Transilvanio tra la Turka Imperio de la sultanoj, tra Irano kaj Hindio ĝis Tibeto, preskaŭ ĉiam piede. Post persistega penado dum jaroj, kiujn li pasigis en tiaj mizeraj cirkonstancoj, kiajn homo apenaŭ iam suferis, li fine, anstataŭ prahungarojn trovi, malfermis antaŭ la scienca mondo la pordon de la tibetaj kulturaj trezoroj kaj fondis novan sciencan branĉon – la tibetologion. Bedaŭrinde, ke li falis poreterne survoje al Lhaso, sed la vortaro kaj la gramatiko de la tibeta lingvo, pretigitaj de li, starigis verajn monumentojn al lia nomo. La biografio ebligas al la leganto ne nur observi la celkonscian strebadon de la scienculo, sed ankaŭ ĝui la ekzotikajn ĝenrojn, kiuj sin trovas inter ĝiaj linioj.

La teksto, ankaŭ la ilustraĵoj, estas sufiĉe bone presitaj. Kaj la lingvaĵo de la traduko fluas tiel facile, ke la legantoj apenaŭ povus diri, ĉu ĝi ne estas originale verkita. Kelkaj misuzoj de la refleksivo (linio 17/p.48, 17/53, 25/58, 17/60 ktp.) kaj plumeraroj, ekz., *skultita* → "skulptita" (11/10), *konatigis* → "konatiĝis" (12/17), *okupigis* → "okupis" (20/24) *1924* → "1824" (29/93) certe ne multe damaĝas la legadon. Cetere, dezirinda estas mapo, pli klara ol tiu sur p.70, por doni al la legantoj pli da ĝuo dum la legado.

La vivo de Sándor Kőrösi Csoma meritas la atenton de Esperantujo, same kiel la pionira agado de Csoma meritas la atenton de la scienca mondo.

Jiang Hongzhang (Ĉinio)



La solan aŭtentikan portreton de Sándor Kőrösi Csoma desegnis Ágoston Schőfft.

Allogaj eroj el franca literaturo

Lokis (1869), Prosper Mérimée (1803-1870). El la franca trad. Marcel Delcourt (1914). Parizo: UFE, 1983. 40p. Ilus. 21cm. Prezo: 7,50 gld.
La nobela burĝo, Molière (1622-1673). El la franca trad. Richard Levin (1902-1969). Parizo: UFE, 1983. 68p. Ilus. 21cm. Prezo: 7,50 gld.

Interesan iniciaton entreprenis *Franca esperantisto*, revuo de Unuiĝo Franca por Esperanto: trifoje jare aperas speciala literatura numero, kiu prezentas ĉefverkon de la franca literaturo, tradukitan en Esperanton. La relative dikaj kajeroj, kiuj enhavas ne nur la tekston mem, sed sur la kovrilpaĝoj ankaŭ

informojn pri la verko, ties aŭtoro kaj tradukinto, povas esti kolektataj aparte, tiel estigante "iam kompletigotan" antologieton de la franca literaturo.

La ekstera aspekto de la kajero estas alloga, la preso bonkvalita, kaj la teksto lerte kompostita. Bedaŭrinde mankas tamen fortika kovrilo, tiel ke ĉiu kajero estas nur enhave libreto en si mem, kiu necesigas apartan pritrakton.

Lokis estas unu el la malpli konataj noveloj de la romantika novelisto Prosper Mérimée, kvankam certe unu el la plej ĉarmaj. Ĝi estas aparte interesa por la esperantista leganto, ĉar ĝia ĉefrolanto estas lingvisto, kiu, esplorante pri lokaj lingvoj en Litovio, travivas misterajn okazaĵojn. Prezentante popolajn legendojn kaj superstiĉojn, la aŭtoro tre imprese vualas liajn travivaĵojn per romantika etoso el omenoj kaj aŭguroj fantastaj, sed permesas al la leganto ankaŭ realisman klarigon de la misteraĵoj. Ĝuste pro tio, tiu ĉi novelo estas rekomendinda eĉ al neabonanto de la revuo.

La nobela burĝo, la majstroverko de la dramatisto Molière el la 17a jarcento, prezentas novriĉulon "ĉiam trompitan" pro lia deziro ŝajnigi, se ne estigi sin nobelo. La traduko en iom klasikeska Esperanto estas same senriproĉa kiel tiu de *Lokis*, sed mi bedaŭras, ke la tradukinto (Richard Levin) ellasis la interaktajn kantojn kaj baletojn; precipe la fina "Baleto de la nacioj" estus defio por ĉiu tradukemulo.

Ne tre amuza por esperantistoj estas verŝajne la primokado de turkoj kaj de ilia lingvo, kvankam la tiel nomata "turka ceremonio" estas denove tre interesa el lingva vidpunkto, ĉar Molière tie paroligas la turkojn en la levantena, anstataŭ en iu turksona galimatio. Bedaŭrinde, la tradukinto ne glosis la malpli facile kompreneblajn vortojn de tiu mediteranea helplingvo.

Fine, mi aldonu, ke tiu ĉi literatura numero estas aparte valora pro kvin tutpaĝaj ilustraĵoj kaj pluraj vinjetoj.

Martin Haase (FR Germanio)

Simioj kaj la bombo

La centa simio (1982), Ken Keyes Jr. El la angla trad. Joek Naber-Keller. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1984. 135p. Ilus. 20cm. Prezo: 7,50 gld.

Jen libro, kiu unike pritraktas la fenomenon de mondo sur la bordo de nuklea milito. Ĝi celas instrui al la leganto pri la minaco de nuklea teknologio kaj proponi eblan solvon.

Ne temas pri sunenergio kaj aliaj laŭbezonaj teknologioj, sed pri psikologio (aŭ pli bone konsciologio) kaj espero. Unue, la aŭtoro rakontas pri diversaj "akcidentoj" militistaj kaj civilaj, kiuj endanĝerigis la vivojn de homoj per elmeto al nuklea radiado. Due, ni informiĝas pri la efikoj de nuklea milito: la tiel nomata "nuklea vintro" kaj la forigo de la ozontavolo, tiel ke ĉiu animalo sen okulprotektilo blindiĝus kaj baldaŭ mortus. Kiel iu sciencisto rimarkigis, tiel okazus "ampleksa ekologia malorganiziĝo".

La problemo ne fontas el la bombo mem, sed apartenas al ni ĉiuj, kiuj vidas la mondan situacion kiel "ni kontraŭ ili". Paradokse, la bezono sin defendi nun endanĝerigas nin. Tiu bezono fontas siavice el la sento de aparteco, tiel ke ni pensas pri "mi kaj ili" anstataŭ "ni". Ni strebu al unueca pensmaniero kaj, kvankam "ni rajtas plu deziri kion ni deziras..., ni lernu ne forĵeti homojn el nia koro".

Kion fari? Jen rolas la fenomeno de la centa simio. Temas pri la komuna aŭ kolektiva konscio, kaj la ebleco konsciigi la homaron pri la danĝeroj per amasagado. La teorio estas, ke se sufiĉe granda pocento de la homoj konscias pri io, tiu scio komunikiĝos al la ceteraj per la komuna konscio, kaj ni povos transsalti la necesan tempon por realigi ŝanĝojn.

La sinsekvo de la faktoj kaj informoj ne ĉiam kondukas al la atendata kulmino. La rezulto de tio kaj iom nelerta traduko malfaciligas la legadon de la libro. Krome ĝenas la mallerta presado de supersignitaj literoj. Tamen la libro enhavas amason da bonaj referaĵoj kaj novan aliron al la problemo. La unueco de la homaro ne estas nova ideo por esperantistoj – kiel alia usona verkisto iam skribis: ja ekzistas du specoj de homoj: tiu, kiu opinias, ke ekzistas du specoj de homoj, kaj tiu, kiu scias alie.

Douglas Witscher (Usono)

Kortuŝa literatura perlo

La morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko (1961), Jorge Amado (1912). El la portugala trad. Geraldo Pádua. Chapecó: Fonto, 1984. 109p. Ilus. de Floriano Teixeira. 21cm. Fonto-serio n-ro 1. Prezo: 12,00 gld.

Burĝe aŭ malburĝe? Kiel do vivi? Eble ĉiuj el ni havas ene emon al unu aŭ alia vivtielo: oni naskiĝas burĝo aŭ ne, laŭ hazardo, sed ne nepre en la koro. (Evidentas, ke pli facilas al burĝo malburĝiĝi ol kontraŭe.) Almenaŭ tia ŝajnas la vidpunkto de Jorge Amado. Pardonu la amatoran psikologiumon, sed prefere ni diru, ke ene de ni ĉiuj estas du emoj: konformemo kaj ĝia malo. Je iuj aĝoj ni estas pli konformemaj (ekz. okjara), je aliaj malpli (ekz. 14-jara). Joaquim Soares Cunha, el bona familio, modela oficisto, modela patro, modela edzo, modela najbaro, 50-jara subite fariĝas Kinkas Akvobleko, malmodela (laŭ vidpunkto!) ebriulo, malmodela malĉastulo, malmodela pigrulo, malmodela deliktulo.

Jorge Amado tre lerte kondukas nin ambaŭflanke de tiu jana vivo. Li ne respondas kial Joaquim fariĝas

Kinkas: tion li ja ne povas diri pli bone ol ni. Sed li permesas al ni percepti la hipokritecon de lia burĝa vivo, la veran bohemiecon de lia koro. Ni povas nur demandi al ni, kiel li sukcesis elteni tiel longe tian subpreman edzinon, tian hipokritan filinon, tian konformeman bofilon.

La mistera titolo de tiu ĉi romaneto aludas la dufojan morton de Kinkas. Efektive, ni devus aldoni unu plian, ĉar li mortis ja trifoje. Unuafoje kiam li fuĝis de la familio, devo, deco. Tiam li "mortis" por la familio, kiu fakte pretendis lin morta. Mortinte burĝo, renaskiĝinte malburĝo. Dum dek jaroj li vivis ĉifone, drinkege, kartlude, malĉaste. Kaj, kiel ĉiuj ni, li finfine eluzis sian tempon kaj estingiĝis. Tio estas lia unua laŭtitola morto. Kaj tuj la familio sin ĵetas sur la kadavron kiel vulturoj, por "repreni", kvazaŭ "reuzi" lin, regajni lian honoran burĝecon: li mortis malburĝo, do li devos "renaskiĝi" burĝo. Kaj tiam li efektive reviviĝas, la amo de liaj kundibocŭloj fakte malmortigas lin por eskapi definitive la kaptilon de la burĝa familio. La rakonto pri tiu lasta nokto estas tutsimpla delira.

Estas evidente, ke por Jorge Amado Kinkas Akvobleko estas granda heroo, apoteozo de la popolo. La aŭtoro lerte komparas la reagojn de la burĝoj, kiuj pensas nur pri ŝajno kaj ŝparo, disde la popolo, "la plej malriĉa kaj plej civilizita". Kortuŝa libro ĝi estas, literatura perlo, kaj la karakterizaj desegnoj de Teixeira estas perfektaj.

Rikardo Cash (Francio)

La vivo de anarkiisto

La morta suito, Miyamoto Masao (1913). Kioto: L' omnibuso, 1984. 169p. Ilus. 21cm. Prezo: 36,90 gld.

La anarkiisto Oosugi Sakae (1885-1923) estas rimarkinda figuro en la moderna historio de Japanio. Dek volumojn ampleksas lia plena verkaro, kaj pri li aperis multnombraj studoj, eĉ doktoraj disertacioj en la angla kaj germana. En tiuj studoj oni kutime trovas almenaŭ menciita la fakton, ke Esperanto estis konsistiga parto de la politika idearo de Oosugi.

Inter esperantistoj ekster Japanio, tamen, Oosugi restis preskaŭ nekonata. Tial estas salutinde, ke Miyamoto provas proksimigi al la Esperanta publiko la personon kaj penson de Oosugi. Lia libro komenciĝas per priskribo de la kruela vivofino de la "danĝera anarkiisto": En septembro 1923 ĝendarma kapitano strangolis Oosugi, lian kunulinon Itô Noe kaj lian okjaran nevon.

Se tiu murdo multe kontribuis al la famo de Oosugi, ankaŭ en lia vivo ne mankas ekscitaj momentoj. En 1901, 16-jara, li estas forpelita el kadeta lernejo pro "friponaĵoj"; en 1906, unuafoje arestita pro partopreno en manifestacio, li eklernas Esperanton en prizono; post la liberiĝo li instruas tiun lingvon al ĉinaj studentoj en Tokio, kiuj poste helpos enkonduki Esperanton (kune kun anarkiismo) en Ĉinion. En 1920, Oosugi ĉeestas en Ŝanhajo, "la urbo de internacia konspiro", Konferencon de Socialistoj en Ekstrema Oriento; en 1923, li troviĝas en Francio kun falsa ĉina pasporto, estas arestita (kaj notas, ke la franca malliberejo estas pli milda ol tiuj, kiujn li spertis antaŭe). Li estas forpelita al sia hejmlando, kie du monatojn poste li iĝas viktimo de la histeria ĉasado kontraŭ suspektindaj personoj sekvinta la grandan tertremon en Tokio.

Ĉion ĉi kaj multon alian, inkluzive la komplikan seksan vivon de Oosugi, priskribas Miyamoto en maniero iom nekutima: Li vaste citas el verkoj de kaj pri Oosugi, lerte kunligante la epizodojn kaj dialogojn prenitajn el tiuj originalaj fontoj per siaj enplektitaj komentoj. Li ironie nomas sian libron "muntdokumento" kaj sin mem "komentama verkisto".

Bonvena, vere interesa libro – kaj eble plej interesa por la specialisto. **Ulrich Lins (FR Germanio)**

Tra la paĝoj

Bukedo, komp. Ĥristo Gorov. Div. aŭtoroj. El la bulgara trad. diversaj. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 78p. Mimeo. 20cm. Tridek tri poemoj kun temoj ligitaj al la postmilita historio de Bulgario. Prezo: 6,00 gld.

Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 031 X. Dudek unu diversaj prelegoj kun antaŭparolo, komentoj kaj notoj pri multaj aspektoj de diskriminacio rasa, etna, kontraŭvirina, lingva ktp.; kun proponoj pri agado. Prezo: 21,00 guldenoj.

Esperanto survoje/Esperanto unterwegs; Variaj kontribuoj/Verschiedene Beiträge, red. Karl Beckmann k.a. Vieno: Aŭstria Esperanto-Instituto, 1984. 163p. 21cm. Dulingva: Esperanto-germana. Kolekto de malsamspecaj tekstoj, kiuj vastasence prezentas Esperanton al neesperantista leganto, kun unupaĝa skizo de prononco kaj gramatiko. Prezo: 15,00 gld.

Esperanto: Einführungskurs, Karl Beckmann. Vieno: Österreichisches Esperantoinstitut, 1984. 87p. 21cm. Germanlingva lernolibro de Esperanto kun 22 lecionoj por memstudado, bazita sur gramatikmetoda pertelefona kurso. Prezo: 10,80 guldenoj.

Facila skeĉ-albumo, Bertram Potts (1895). Chapecó: Fonto, 1984. 112p. 21cm. Fonto-Serio n-ro 3. Cent mallongaj skeĉoj por legado aŭ prezentado, taŭgaj por klasoj kaj klubvesperoj. Prezo: 12,00 gld.

Forpasinto, La (1957)/**Edvardo kaj Agripina**, René de Obaldia (1918). El la franca trad. George Lagrange. Parizo: TESPA, 1984. 23p. 21cm. Du amuzaj teatraĵetoj por malmultaj roluloj. Prezo: 6,00 gld.

Georgo Dandin; Komedio en tri aktoj (1667), Molière (ps. Jean Baptiste Poquelin, 1622-1673). El la franca trad. L.L. Zamenhof (1859-1917). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (4a eld., represo el 1908). 51p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 9. Unu el la klasikaj komedioj de la granda franca dramisto pri triangula amrilato. Prezo: 12,50 gld.

Gramatika ekzercaro de Esperanto, J.P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1984. 24p. Mimeo. 21cm. Morfologiaj kaj sintaksaj ekzercoj plus listo de gramatikaj terminoj kun pola traduko. Prezo: 2,40 gld.

Gvidlibro por esperantistaj ĉiĉeronoj kaj ekskursgvidantoj, Max Finkenzeller. Bydgoszcz: Monda Turismo, 1983. 15p. Mimeo. 19cm. Rekomendaro por estroj de turismaj grupoj. Prezo: 1,80 gld.

Homa voĉo, La (1929)/**Bela indiferentulo, La** (1939), Jean Cocteau (1889-1963). El la franca trad. Roger Bernard (1907). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1984. 32p. 21cm. Speciala literatura n-ro de *Franca esperantisto, n-ro 354*. Du mallongaj teatraĵoj de multflanka kaj pridisputita verkisto, konata pro sia novigo kaj eksperimentemo. Prezo: 7,80 gld.

Horizonto de Soveta Litovio; Sepa kajero, red. R. Šurkutė k.a. Vilnius: Mintis, 1984. 45p. Ilus. Muziknotoj. Mimeo. 29cm. Kolekto de diversspecaj tekstoj beletraj, sociaj, politikaj, Esperanto-movadaj. Prezo: 3,00 gld.

Istorija i sovremennoe sostojanie interlingvistiki; Interlinguistica Tartuensis 3, red. Paul Ariste (1905) k.a. Tartu: Tartuskij Gosudarstvennyj Universitet, 1984. 183p. 22cm. Sep traktaĵoj en la rusa kaj unu germana pri aspektoj de la historio kaj nuntempa stato de la interlingvistiko; kun resumoj en Esperanto, la germana aŭ franca. Prezo 18,00 gld.

Language Awareness and the Place of Esperanto, Allan E. Nutton. Londono: Esperanto Centre, 1984 (jaro neindikita). 4p. 30cm. Anglalingva inform-broŝuro pri la konsciiga rolo de Esperanto en la lernejo. Prezo: 3,60 gld.

Legu aktivulo 1 (1983) kaj **2**, komp. J.P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1984 (2a eld. de parto 1). 18+18p. Mimeo. 21cm. Bazaj informoj por novlernintoj pri la historio kaj evoluo de Esperanto kaj ĝia movado. Prezo: 2,40 gld.

Monda Komunika Jaro: Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado. Rotterdam: UEA, 1984. 11p. 21cm. Esperanto-dokumento 19E. Du prelegoj el la 68a Universala Kongreso: "Monda Komunika Jaro kaj malŝlosiloj al komunikado" de Richard E. Butler (ĝen. sek. de Internacia Telekomunika Unio) kaj "Sen lingva interkompreniĝo la maŝinaro estos senpova" de Humphrey Tonkin. Prezo: 3,00 gld.

Muminvalo; Rakontoj (1963), Tove Jansson. El la sveda trad. Eckhard Bick. Bonn: Esperanto-Junularo, 1984. 118p. Ilus. Mimeo. 21cm. Ne nur por infanoj, la aventuroj el la fantazia mondo de Muminvalo de jardekoj furoras sur la skandinava infanlibra kaj bildstria merkato; kun glosaro. Prezo: 11,40 gld.

Obsedo; Poemaro, Karolo Piĉ (1920). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 144p. Ilus. 21cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 6. Emocia poemaro aranĝita laŭ la sezona ciklo de la jaro, kun postparolo kaj glosaro. Prezo: 30,00 gld.

Oraj pensoj, red. J.P. Bieliński. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1983. 21p. Mimeo. 21cm. Proverboj, aforismoj, sentencoj ks. el diversaj fontoj. Prezo: 2,40 gld.

Diversaĵoj:

A la découverte de l'espéranto; Tout savoir sur la Langue Internationale. Parizo: Union Française pour l'Espéranto, 1984. Kaseto. Informoj pri Esperanto por franclingvanoj. Prezo: 5,40 gld.

Internacia Esperanto-Kursejo 1985. Sofio: Internacia Esperanto-Kursejo, 1984. Kolorilus. 68×49cm. Unufolia murkalendaro de la kursejo en Pisanica. Prezo: 15,00 gld. por 10 ekzempleroj (minimuma mendokvanto).

Korspiro, kantas J.M. Bundy k.a. San-Diego: Muzikoro, 1984. 33t/m. 18cm. Duflanka. Kvar originalaj Esperantaj kantoj kun teksto. Prezo: 21,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

TEJO-paĝo

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Internacia Junulara Jaro: Ĉu ĝi estas por la kvarmiliarda homo?

Kiel konate, la jaro 1985 estas Internacia Junulara Jaro. Nia movado, pere de komuna komisiono de TEJO-UEA, disvolvas detalan agadplanon (peteblan de la Ĝenerala Sekretario de TEJO, adreso ĉi-supre). Tamen, tiu plano celas difinitan parton de la mondo, kaj difinitan parton de la homaro. Por pruvi tion, mi

Foto: Oxfam – Peter Keen



volas prezenti al vi la sekvan artikolon, prenitan el anglalingva eldonaĵo. Ĝi estas atesto, eble iom tro retorika, pri la vivkondiĉoj de granda parto de la homaro, kiujn oni ja devus plibonigi kiel eble plej rapide kaj efike, antaŭ ol pludiskuti pri pli subtilaj, altnivelaj temoj. Reagoj al la artikolo estos bonvenaj ĉe la supra adreso.

La kvarmiliarda homo naskiĝis ie en Azio, Afriko, Latinameriko aŭ Eŭropo. Plej probable li naskiĝis en Azio, kie la situacio estas difinita per scienca termino kiel "demografia eksplodo". Sed, kia estos la estonteco de tiu infano? Se li naskiĝis en Hinda Unio, li estos unu el inter miliardo da homoj (unu kvarono de la monda loĝantaro). Tre probable lia naskiĝloko estas unu el la kabanvilaĝoj, kie svarmas homoj. Lia patro verŝajne estas manlaboristo, kaj lia patrino, laca pro la multaj akuŝoj, ne havas sufiĉan mamlakton por nutri lin. La prezo de la porinfana lakto de Nestlé (aŭ kiu ajn el la multnaciaj konzernoj) estas ekster la akirebleco, kaj la patrino nutros lin per malmulta rizfaruno, boligita en ia akvo apenaŭ dolĉigita per malmulta melaso.

Se la infano estas vere bonŝanca, li pluvivos kiel kelkaj el liaj gefratoj kaj, se li havas iom pli da bonŝanco, lin ne kaptos poliomjelito aŭ aliaj malsanoj. Li verŝajne vizitos lernejon en la centro de la kabanvilaĝo, kaj ĉiujare, ĉe Kristnasko, li ricevos kelkajn donacojn de infanoj el tre malproksimaj landoj. "Ili estas vere bonŝancaj", li ploros al si. Kiam li estos sepaŭ okjara, li apenaŭ kapablos legi kelkajn vortojn en la hindia, sed li certe scios kiel havigi al si kelkajn monerojn, pozante por la grandaj ĵurnalistoj, kiuj fotas la kabanvilaĝon. Li fumas jam, ekde kiam li estis nur kvinjara. Li kutimas preni la cigaredrestaĵojn de sur la stratoj... Dekdu-jara, li forlasas la lernejon, ne pro tio, ke li ne estas inteligenta, sed pro "manko en la lerneja medio", kiel komentus sociologo. Tiutempe lia patro atingis sian kvaran vivjardekon kaj ektusis: liajn cindrojn oni ĵetis en la riveron Gango iun vintran matenon, laŭ la tradicio.

Lia patrino vokos lin plorante kaj diros, ke nenio estas por manĝi kaj ke li devos esti rizprovizanto por nutri ankaŭ la gefratojn. En sia dekdua jaro li iĝos metilernanto ĉe maŝino dek fojojn pli granda ol lia magra silueto. La maŝino ne estas plu uzata en aliaj landoj, sed tion li ne scios. En sia dekkvara jaro li provizos sufiĉe por la plua vivteno de sia maljuna patrino tridekkvin-jara: bedaŭrinde neniu el la fratoj pluvivis. Du fratinoj estis edzinigitaj, sed poste repudiitaj de la edzoj, ĉar la doton oni taksis nesufiĉa. La jaroj pogute forpasas: lia sola ŝatokupo estas iri al la kinejo, kiam oni pagis lin... revi pri landoj kaj popoloj, kiuj ne estas malfeliĉaj.

Dekok-jara, li edziĝas kaj ene de unu jaro lia edzino naskas etan inon: "Tio estas honto", krias lia patrino...

Jen plena vivo, sen ia ajn surprizo kaj sen la scio, ekzemple, kio estas ia Internacia Junulara Jaro..., sed oni ne povas nei la fakton, ke multaj homoj en pluraj landoj de nia planedo vivas ĝuste kiel li.

Internacia seminario

de TEJO pri *Kooperativoj kaj junularo* okazos en Tuzla, Jugoslavio, de la 22a ĝis la 28a de septembro 1985. La plena kotizo estos 150 guldenoj. Ĝi inkluzivas la programon, loĝadon kaj ĉiujn manĝojn. Oni devas antaŭpagi 30 guldenojn al TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Jugoslavoj povas pagi al Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio, Vase Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio. Prezento de la seminaria temo aperos en la marta numero.

Iloke

● **Aŭstrio:** En la decembra numero de la ilustrita gazeto *Lebendiges Linz*, eldonata de la urbo Linz en 97 mil ekzempleroj, aperis unupaĝa artikolo pri Zamenhof de s-ino Elisabeth Oberlik.

● **Britio:** La intensaj Esperanto-kursoj en Barlaston, direktataj de d-rino Marjorie Boulton, festos sian 25-jaran (t.n. arĝentan) jubileon per aparte riĉaj kursoj (de la 10a ĝis la 16a de aŭgusto) kaj konferenco (de la 17a ĝis la 23a de aŭgusto) pri "Internaciaj aspektoj de plenkreskula klerigado: Lingvo kaj internacia interkompreniĝo". Prelegos i.a. William Auld, Ivo Lapenna kaj Paul Neergaard. Pliaj detaloj haveblas de la kolegiestro (kiu komprenas Esperanton): Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DC, Britio.

● Okaze de la 50a Jubilea Brita Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Norwich en 1966, la magistrato de la urbo Norwich decidis nomi centre lokitan promenvojon "Esperanto Way" (Vojo Esperanto). La nuna magistrato decidis forigi tiun nomon. Eventualajn protestojn oni povas sendi al City Council, City Hall, Norwich, Norfolk, Britio.

● **Ĉeĥoslovakio:** La 16an de aŭgusto pasintjare aperis 260-vorta intervjua portreto de la esperantista verkista paro Oldřich Kníchal kaj Éva Tófalvi en la porjunulara semajna gazeto *Mladý svět* (420 mil ekz.).

● **FR Germanio:** Por la unua fojo post multaj jaroj, granda germana ĵurnalo aperigas Esperanto-kurson. Inter januaro kaj aprilo aperas en *Augsburger Allgemeine* (Aŭgsburga ĝenerala ĵurnalo), kun eldonkvanto de 300 000 ekzempleroj, kurso laŭ iniciato de Stefan Maul, redaktoro ĉe la ĵurnalo kaj ĉefredaktoro de la Esperanta gazeto *Monato*. La kurso, vide al la 70a Universala Kongreso, aperos en ĉiuj regionaj eldonoj en la bavara parto de Ŝvabio inter la rivero Danubo kaj Alpoj.

● **Japanio:** La porgazetara bulteno en la japana *Esperanto tûsin* (Esperanto informas) jam de unu jaro denove aperas. Ĝin eldonas Japana Esperanto-Instituto regule ĉiun duan monaton.

● **Kongo:** La 1-an de decembro oni fondis Esperanto-Klubon Zamenhof en Pointe Noire (adreso: B.P. 1841, Pointe Noire, Kongo). La klubo kunvenas ĉiun dimanĉon. La prezidanto de la klubo, Lourenço Capita, provas aranĝi tradukon de informilo en la kituban, kiu estas simpligita (kreola) lingvo bazita sur la konga kaj vaste uzata kiel interlingvo en suda Kongo.

● **Norvegio:** Norvega Esperantista Ligo kaj Norvega Esperantista Fervojista Asocio ricevis heredaĵon de duonmiliono da norvegaj kronoj (prok. 195 000 gld.) de ges-roj Ruth kaj Rolf Uhlen (1910-1970). Laŭ la statuto de la jam starigita komuna fonduso, la kapitalo restas senmova kaj ricevas jaran renton de proksimume 15%.

● **Pollando:** Du renomaj ŝtataj eldonejoj en Pollando lastatempe ĉerpis el la Esperanta literaturo. Eldonejo Czytel-

ĈU VI KONAS LA TERON?

Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj

Altnivela enkonduko en la geologion, la plej grava kaj ampleksa antaŭenpaŝo sur la kampo de tiu scienco en la Internacia Lingvo.

Ĉi tiu longe atendita libro pri la geologio estas originale verkita en Esperanto de d-ro Endre Dudich kaj eldonita de Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto.

Endre Dudich traktas en populariga maniero tra 12 ĉapitroj ĉiujn subbranĉojn de la geologio, i.a. la mineralogion, paleontologion, terhistorion, geofizikon kaj kosmogeologion. Ĉiun ĉapitron akompanas abundaj figuroj kaj tabeloj, kiuj vivigas kaj klarigas la tekston. Fine de la libro troviĝas faka leksikoneto kaj listo de literaturo.

150 paĝoj plus 60 paĝoj da scienc-teknikaj anoncoj. Formato 23cm. ISBN 963 571 080 1. Por la elstare alloga prezo de **nur 12,00 gld.** (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj) de la sola distribuanto: Libroservo de UEA.

nik aperigis rakontojn de Julia Pióro (1902) sub la titolo *Wieczór Świętej Anny* (Vespero de Sankta Anna; ISBN 83 07 00920 0). La 82-paĝa libro, presita en dek mil ekzempleroj, rapide vendiĝas. Eldonejo Wydawnictwo Literackie enmerkatigis la verkon de Victor Lebrun (1882-1979) *Leo Tolstoj; La homo, la verkisto kaj la reformisto* (Eld. Gabrielli, 1978) en 158-paĝa traduko de Tyburcjusz Tyblewski, *Wspomnienie o Lwie Tołstoju* (Rememoro pri Leo Tolstoj; ISBN 83 08 01415 1). Tria eldonejo, Karkonoskie Towarzystwo Naukowe, antaŭ nelonge publikigis 306-paĝan volumon de sciencaj traktaĵoj de diversaj aŭtoroj sub la titolo *Społeczenstwo – kultura – szkoła* (Socio – kulturo – lernejo; ISSN 0238 9940/28) kun Esperantaj resumoj.

● **Srilanko:** Malgraŭ la interetnaj problemoj en Srilanko, Stefano Keller el Svislando denove vizitis la insulon por helpi la lokan Esperanto-movadon. Oni aranĝis kursojn, i.a. en Universitato de Kolombo, kie la rektoro kaj estraro de la universitato partoprenis. La 15an de novembro la svisa ambasadoro parolis en informvespero pri Svislando, Kultura Centro Esperantista, Nederlando (prelegis s-ino Elisabeth Vuurmans) kaj Esperanto. Pluraj unuopuloj kaj grupoj en eksterlando kontribuis al la lastatempa disvolviĝo de la loka movado en Srilanko.

Foto: R. Resende

● **Brazilo: La 15an de decembro Esperanto-Asocio de Brasília inaŭguris sian propran modernan sidejon, proksiman al la urbocentro. La asocio aĉetis la ĉambrojn – komfortan lernoĉambron kaj sekretariejon, kie funkcias ankaŭ libroservo kaj biblioteko – per sia profito el la 66a Universala Kongreso, kiu okazis en Brazilio. Infanoj Márcia kaj Estela kantis Esperante en la malfermo.**

Fake

● **Aplika lingvistiko:** En la nederlanda revuo *Taal en beroep* (lingvo kaj profesio), eldonata de Nederlanda Asocio por Aplika Lingvoscienco, aperis artikolo de Alex Olde Kalter "Teknologia novigo: Novaj eblecoj por la artoj" en la nederlanda kun angla resumo. Ĝi temas pri la eventuala efiko de la uzo de duon-aŭtomata tradukado por krei novajn postenojn. Alex Olde Kalter estas kunlaboranto en la projekto DLT (vd. *Esperanto*, p.5, 1984).

● **Geologio:** Okaze de la 27a Internacia Geologia Kongreso en Moskvo (de la 3a ĝis la 15a de aŭgusto), la faka redaktoro de *Geologio internacia*, vicdirektoro de Hungara Geologia Instituto kaj aŭtoro de *Ĉu vi konas la Teron?*, d-ro Endre Dudich, transdonis al la vicprezidanto de la organiza komitato, akademiano V.V. Menner, ekzempleron de la kvina volumo de *Geologio internacia*, eldonita de Scienca Eldona Centro de UEA. Internacia Geologia Kongreso havas ses oficialajn lingvojn, sed dum la pasintjara sesio okazis samtempa interpretado inter nur la angla kaj rusa. *Geologio internacia* estis ankaŭ montrata kaj disdonata ĉe la hungara ekspozicia stando Geokarta, kaj oni poŝte sendis ĉirkaŭ mil ekzemplerojn al kongresanoj.

● **Diskoj:** En la pasinta jaro aperis ankoraŭ tri diskoj de didaktikaj kantoj de Sylla Chaves: *Paco, amo kaj naturo, Kantu kaj lernu 3* kaj *La bufo*. Lia jam multjara laboro sur tiu kampo estas unika en la Esperanto-movado. Espereble la Libroservo de UEA povos baldaŭ oferti ankaŭ tiujn plej lastajn diskojn de Chaves al la publiko.

● **Dulingveco:** En oktobro okazos en Milano, Italio, internacia konferenco pri "Lingvoj, teknologio kaj eŭropa unuiĝo" de Monda Informcentro por Dulingva Edukado. Personoj, kiuj dezirus partopreni tiun neesperantistan konferencon, povas ricevi pliajn informojn de Centre mondial d'information sur l'éducation bilingue, Centro Associato Lombardo, Pza Volontari 3, I-20145 Milano, Italio (tel. 02/3182704).

● **Eldonprojektoj:** La hungara ŝtata diskeldonejo Hungaroton aperigos en marto du Esperantajn diskojn en unu koverto sub la titolo *Bukedo el la hungara poezio*. Por la disko pli ol dek geaktoroj deklamis pli ol 50 hungarajn poemojn en Esperanto.

● **Genetiko:** Ĉe Federacia Universitato de Rio Grande do Sul, Brazilo, aperis la portugallingva disertacio *Variado de la citogenetikaj efektoj, pro la translokiĝo, inversioj kaj fragilaj punktoj, en la homa malkapablo naski* de d-ro Renato Zamora Flores. La disertacio havas dupaĝan Esperantan resumon.

● **Informadiko:** En la Esperanto-klubo de Rennes troviĝas pluraj kompetentuloj pri informadiko, kiuj organizas semajnfinajn staĝojn por praktikado de la fako kun Esperanto. Iliaj estontaj aranĝoj okazos la 9-10an de februaro, la 20-21an kaj la 27-28an de aprilo. Pliajn informojn donas s-ro Christian Bertin, 60 allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio.

● **Instruado:** Aperis la kvina ĝisdatigita eldono de *Oficiala situacio de la*

Esperanto-instruado en la mondo, kompilita de Germain Pirlot. La 21-paĝa broŝuro estas aparta eldono, sendita nur al la informintoj. La informoj tamen poste aperos kiel Esperanto-dokumento de UEA. Se oni komparas la sciigojn kun tiuj de la kvara eldono (1983), oni rimarkas, ke ankoraŭ kreskas la renomo de Esperanto en la universitata medio: kompare kun 79 tiaj oficialaj altlernejaj kursoj de Esperanto en 17 landoj en 1983, nun estas 110 kursoj en 23 landoj. Se vi havas kompletigajn informojn pri tia oficiala instruado, bonvolu sendi ilin al s-ro G. Pirlot, Kemmelbergstraat 5/B.3, B-8400 Oostende, Belgio.

● De la 9a ĝis la 14a de decembro 1985 denove okazos internacia faka seminario en Bad Saarow, apud Berlino, Germana DR. Oni traktos la temon "Problemoj de metodiko de Esperanto-instruado al plenkreskuloj". La kotizo estas 100 markoj, pageblaj surloke. Interesitoj povas ricevi detalajn informojn de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, DDR-1080 Berlin, Germana DR.

● **Interlingvistiko:** De la 27a de aprilo ĝis la 1-a de majo okazos la 13a Scienca Interlingvistika Simpozio en Varsovio. Ĝin organizas Akademia Centro Interlingvistika, Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa, Pollando, de kie oni povas ricevi detalan informilon.

● **Literaturo:** Honore al la verkistino Clelia Conterno Guglielminetti (1915-1984), *Literatura foiro* anoncis literaturan konkurson nur por virinoj. Ankaŭ la juĝkomisiono konsistos nur el virinoj. La konkurso havas tri branĉojn: poezio, novelo kaj recenza eseo. Kvankam la ĉijara limdato estas la 31a de januaro, verkemaj virinoj povos ricevi pliajn detalojn pri la venontjara konkurso de s-ino Rosanna Perottino, via Alfano 1, I-10154 Torino, Italio.

● **Parlamenta agado:** La 13an de decembro Eŭropa Esperanto-Centro okazigis akcepton por eŭropaj parlamentanoj kaj oficistoj en la sidejo de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo. La oficiala invitanto estis d-ro Hans-Joachim Seeler, eŭropa parlamentano el FR Germanio kaj nun prezidanto de Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo. Ĉeestis la malgrandan akcepton tri aliaj eŭropaj parlamentanoj: s-ino U. Braun-Moser (FR Germanio), I. Christensen (Danlando) kaj L. Beyer de Ryke (Belgio).

Personoj

● **Ariste:** Festis la 80an datrevenon de sia naskiĝo la 3an de februaro prof. Paul Ariste, membro de Honora Patrona Komitato de UEA (vd. *Esperanto*, p.182 de 1984). Ariste estas i.a. prezidanto de la ekzamena komisiono pri Esperanto ĉe Stata Universitato de Tartu – la sola tia supera ekzamena institucio en Sovetunio.

● **Caruso:** Pasintan decembron d-ro Paulo Domingos Mieres Caruso enoficiĝis kiel akademia vicrektoro de Federacia Universitato de Pelotas, Brazilo. La universitato havas proksimume ses mil studentojn. Caruso krome estas la prezidanto de Esperanto-Societo de Pelotas.

● **Frank:** Sub la konstanta rubriko "Kroniko de Esperanto" aperis en la franclingva ĵurnalo *La dernière heure* (125 000 ekz.) de Bruselo 350-vorta intervjuo al prof. Helmar Frank pri liaj kibernetikaj-pedagogiaj esploroj rilate Esperanton. La intervjuon faris Germain Pirlot.

● **Giessner:** La 8an de oktobro Joachim Giessner ricevis la altan ŝtatan ordonon Meritokruco de Federacia Respubliko Germanio. Giessner jam jardekojn laboras helpe de Esperanto por amika interkompreniĝo inter la popoloj. Li de 1968 estas prezidanto de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, la plej granda faka asocio aliĝinta al UEA. Ankaŭ kvar reprezentantoj de gazetoj ĉeestis la solenan transdonon.

● **Haazen:** En novembro Jo Haazen, direktoro de la fama Reĝa Kariljoninstituto de Mechelen (Belgio), vizitis Japanion kiel kultura sendito de la belga registaro por inaŭguri kariljonon, donacitan de la flandra popolo al la japana popolo. Kariljono estas plurtuna bronza instrumento kun multe da sonoriloj, kiun oni ludas per pugnoj kaj piedoj, pere de bastonklavaro kaj pedaloj.

● **Seppik:** Henrik Seppik, siatempe multlande konata Cseh-metoda instruisto kaj verkinto de la populara lernolibro *La tuta Esperanto* (3a eld. 1984) fariĝis 80-jara je la 9a de februaro. Seppik nun tradukas kaj redaktas la plimulton de Esperantaj libroj en Estonio.

Oficiala informilo

ADRESŜANĜO DE ĈINA ESPERANTO-LIGO

Ĉina Esperanto-Ligo havas novan poŝtkestan adreson: P.O. Kesto 825, Beijing, PR Ĉinio, kiu nun diferencas de tiu de la redakcio de *El popola Ĉinio*.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: S-ino J. Heetkamp. Svislando: S-ino R. Filali.

DONACOJ 1984 (Gld.) ĝis la 31a de decembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Argentino: Heriberto Reichart 171,80. Nederlando: S-ino E. Maasbommel 100,00; S-ino A.J. Middelkoop 250,00; R. Moerbeek 400,00; S-ino S.A.K. v.d. Zee 150,00. Anonima donaco 1 250,00. Diversaj malgrandaj 19,76. Sumo jara 23 336,49.

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: A. Hanke 12,51; A. Hartwig 13,00; A. Knebusch 39,48. Nederlando: S-ino E. Maasbommel 100,00; S-ino A.J. Middelkoop 250,00; W. Rodenhuis 53,00; R. Slot 50,00; S-ino S.A.K. v.d. Zee 50,00. Norvegio: S-ino T. Kawakami-Nielsen 1 953,43. Anonima donaco: 1 250,00. Sumo jara 7 686,85.

FONDAĴO CED: Sumo jara 39,00.

ĜENERALA KASO: Nederlando: G. Ellerman 30,00; M.C.J. v.d. Graaf 40,00; F.G. Kokken 12,25; S-ino M.A. v.d. Kooij 50,00; G.F. Makking 1 000,00; R. Moerbeek 100,00; S-ino E.S. Otto 10,30; W.P. Roelofs 24,00; S-ino W. Torenvlied 10,00; S-ino S.A.K. v.d. Zee 100,00. Svislando: H. Schmutz 54,50. Diversaj malgrandaj 4,00. Sumo jara 12 730,67.

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: R. Slot 1 350,00. Sumo jara 12 940,65.

FONDAĴO KER DE TEJO: Sumo jara 24 287,47.

JUBILEA JARO: Francio: M. Sujet 36,60. Nederlando: S-ino L. Adelaar 100,00; S-ino B.M. Slösser 50,00; H.

La membraro de UEA en 1984

Lando	AM	IM	Sumo
Acoroj	0	1	1
Andoro	0	1	1
Angolo	0	1	1
Argentino	184	74	258
Aŭstralio	140	111	251
Aŭstrio	260	64	324
Bangladeŝo	0	1	1
Belgio	853	261	1114
Bermudo	0	1	1
Bolivio	0	2	2
Brazilo	959	216	1175
Britio	1000	349	1349
Bulgario	5110	97	5207
Ĉeĥoslovakio	2372	103	2475
Ĉilio	41	13	54
Ĉinio	1112	58	1170
Danlando	258	107	365
Ebura Bordo	0	4	4
Egiptio	0	2	2
Ekvadoro	0	1	1
Finnlando	490	208	698
Francio	522	590	1112
FR Germanio	927	458	1385
Gabono	0	1	1
Gambio	0	1	1
Germana DR	400	17	417
Greklando	386	31	417
Gvatemalo	0	1	1
Haitio	0	1	1
Hinda Unio	0	16	16
Hispanio	425	165	590
Honkongo	0	5	5
Hungario	3115	152	3267
Indonezio	0	4	4
Irano	0	82	82
Irlando	54	13	67
Islando	14	37	51
Israelo	248	69	317
Italio	1491	237	1728
Jamajko	0	1	1
Japanio	1058	361	1419
Jugoslavio	1026	174	1200
Kamerunio	0	1	1
Kanado	207	108	315
Kenjo	0	2	2
Kolombio	30	24	54
Kongo	0	2	2
Korea Resp.	413	53	466
Kostariko	0	2	2
Kubo	100	19	119
Libano	0	2	2
Luksemburgio	95	7	102
Madagaskaro	0	1	1
Malajzio	0	3	3
Malto	70	2	72
Maroko	0	4	4
Meksikio	22	22	44
Mongolio	0	3	3
Namibio	0	1	1
Nederlando	332	417	749
Nepalo	0	3	3
Nigerio	0	2	2
Nikaragvo	0	1	1
Norvegio	323	96	419
Nov-Zelando	101	70	171
Pakistano	0	10	10
Peruo	14	6	20
Pollando	6700	108	6808
Portoriko	0	1	1
Portugalio	266	27	293
Reunio	0	1	1
Rumanio	0	27	27
Ruando	0	5	5
Salvadoro	0	1	1
Sanmarino	0	1	1
Senegalio	0	1	1
Singapuro	0	1	1
Sirio	0	1	1
Sovetunio	0	74	74
Srilanko	0	4	4
Sud-Afriko	39	26	65
Sudano	0	2	2
Sud-Jemeno	0	1	1
Svazilando	0	1	1
Svedio	1089	389	1478
Svislando	137	159	296
Tajlando	0	3	3
Tunizio	0	2	2
Turkio	0	2	2
Urugvajo	0	4	4
Usono	308	424	732
Venezuelo	17	26	43
Vjetnamio	0	5	5
Zairio	41	8	49
94 landoj	**32749**	**6256**	**39005**

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBROSTATISTIKO DE UEA POR 1983 KAJ 1984

Kategorio	**1983**	**1984**
Membro-Jarlibro	1057	1170
Membro-Abonanto	3966	3686
Dumviva Membro	995	982
Honora Membro	24	29
Juna M-Jarlibro	189	197
Juna M-Abonanto	215	192
Individuaj Membroj	**6446**	**6256**
Aligitaj Membroj	22265	23286
Ĝunaj Al. Membroj	8797	9463
Membroj entute	**37508**	**39005**
Societo Zamenhof	182	167
Abonoj *Esperanto*	266	274
Kolektivaj ab. *Eo*	960	1005
Abonoj *Kontakto*	430	462
Kolektivaj ab. *Kto*	400	610
Patronoj TEJO	82	65
Kotizoj entute	**39828**	**41588**

Noto: Temas nur pri la pagitaj kotizoj. La nombro de la aligitaj membroj estas rekorda, ĉefe dank' al Pollando. La nombro de la individuaj membroj rimarkeble falis en Brazilo, Britio, FR Germanio, Nederlando kaj Svedio, dum ĝi en Irano kreskis per 69 en 2 jaroj.

Smits 500,00. Svislando: LW 54,40. Sumo jara 8 277,90.

PROPAGANDA KONTO: Sumo jara 0,00.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: S-ino E.M. Maasbommel 50,00; W.P. Roelofs 15,00. Sumo jara 240,49.

BUDAPEŜTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): Belgio: G. Pirlot 48,60; FR Germanio: S-ino R. Paintner-Trumpp 451,20. Sumo jara 5 008,80.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Sumo jara 619,75.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Sumo jara 33 050,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologoj

FRANK M. EASTON (1903-1984) mortis la 4an de septembro en Birmingham, Britio. Li dum multaj jaroj aktive informis pri Esperanto i.a. per ĵurnaloj.

KARL L. GUSTAFSSON (1911-1984) forpasis en novembro en Bergvik, Svedio. Li dum multaj jaroj estis delegito en Söderhamn kaj kelkmonate laboris en la Centra Oficejo de UEA.

LAVOSLAV KRAUS (1897-1984), medicinisto, mortis la 28an de decembro en Beogrado, Jugoslavio. Li lernis

Esperanton en 1911. Kiel prezidanto de la Esperanto-klubo en Osijek, li en 1933 grave kontribuis al pli bona organizo de la enlanda movado. Li dum pluraj jaroj estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo.

EDMOND KALMAN BAUMSLAG (1902-1984) forpasis la 16an de novembro en Dunkeld, Sudafriko. Nur dekjara li komencis instrui Esperanton. Li estis dumviva membro de UEA.

O.H. BEHNCKEN forpasis la 20an de oktobro en Camp Hill, Aŭstralio. Li estis membro de UEA de 1955.

C.J. CALDERA, kuracisto, mortis la 9an de oktobro en Perth, Aŭstralio. Li estis dumviva membro de UEA.

IRÈNE COURTENAY forpasis la 4an de januaro en Mt. Waverley, Aŭstralio. Ŝi antaŭe estis la delegito en Melburno kaj pli frue la ĉefdelegito en Maroko.

GIORGIO LÉGORI mortis antaŭ kelka tempo en Intra, Italio, kie li estis la vicdelegito kaj fakdelegito pri turismo.

JÓZSEF NÁRAY (1898-1984) forpasis en Budapeŝto, Hungario, kie li estis fakdelegito pri maŝintekniko.

GIOVANNI SAGGIORI, radioteknikisto, forpasis antaŭ nelonge en Italio. Li estis la delegito en Padova jam de 1945.

IDA SAVILLE mortis antaŭ kelka tempo en Los-Anĝeleso, Usono. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

EDWIN THOMAS (1931-1984) forpasis en Lyss, Svislando, kie li estis la delegito. Li estis ankaŭ dumviva membro de UEA.

Kulturdomon en Britujo (inspiritan de Grésillon, La Chaux-de-Fonds k.a.) celas starigi grupo de britaj esperantistoj, honore al la Jubileo. Ili komencas iom-post-iome, kaj tiel en 1985 ili havos je dispono domon por la monato aŭgusto. Oni bonvenigas gastojn (lito kaj matenmanĝo kostas 5 pundojn), kiuj deziras viziti belan regionon en la mezo de Anglujo, 12 kilometrojn norde de Derby. Antaŭanoncu vin al Hilary kaj Pat Chapman, Esperanto-domo, 50 Holbrook Road, Belper, Derbyshire DE5 1PB, Britujo.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Instruistino (pensiulino) pri biologio kaj kemio deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj landoj, sed aparte pri medioprotektado. Ŝi krome serĉas korespondantojn por sia rondo de infanoj 10- ĝis 12-jaraj. S-ino Ingeborg Neumann, Leibnizstr. 5/67, DDR-2000 Neubrandenburg, Germana DR.

Kvakera Esperantista Societo. Ni anoncas novan represon de *Konsiloj kaj demandoj*, la fama konsilaro el Kvakeroj de Londono (75 pencoj inkl. sendokoston). Aliaj interesaj, legindaj broŝuretoj – aktualaj pensoj pri la nuna mondo. Listo, prezoj haveblaj de s-ro John Owen, 54 Selborne Road, Southgate, London N14 7DH, Britujo. Ĝirkonto 56-823-8303.

22-jara artisto-skulptisto volas korespondi pri arto, estetiko, muziko, libroj



kaj vojaĝoj. Bv. aldoni vian foton. S-ro Sossa Gilles Rogatien (voknomo: Gisoro), B.P. 1723, Cotonou, Benino.

Anoncetoj

Tarifo: *ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

Kemia teknikisto pri fermentado kaj produktado de trinkaĵoj deziras korespondi pri tiu fako. S-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyékonakpoè, Lome, Togo.

Espermenso = esperantistoj en Mensa. Kio estas Mensa? Respondon vi ricevos sendinte informpeton kaj 2 irpk. al f-ino Roberta Knoblauch, 231 E. Church St., Lewisville, TX 75067, Usono.

Serĉata: junul(in)o kapabla instrui Esperanton en internacia feria vilaĝo apud Chambery, Savojo, dum julio. Kondiĉoj haveblaj de s-ino M. Bodard, 19 Bd Mourichon, F-73100 Aix les Bains, Francio.

Sylvio Malheiros – skribu al mi. Karl L. Sherwood, 2717 Curtis Dr., Amarillo, TX 79109, Usono.

26-jara litova fraŭlo deziras korespondi; kolektas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. S-ro Laimius Stražnickas, Poŝtkesto 1469, SU-232040 Vilnius-40, Litova SSR, Sovetunio.

Skota Federacio Esperantista invitas vin al sia 80a Kongreso (12-14 aprilo 1985) en Glasgovo, Skotlando. Kostos ne pli ol 37 britajn pundojn, inkl. loĝadon kaj manĝojn. Petu detalojn de s-ro Stanley Nisbet, 6 Victoria Park Corner, Glasgow, G14 9NZ, Skotlando (tel. 041/959 5801).

Originalajn poemojn de L.N.M. Newell (1902-1968) serĉas por eldono s-ro Edwin de Kock, Posbus 143, RSA-0009 Bon Accord, Sudafriko.

Salutu la miljarfeston de nia urbo: Wolverhampton Millenium, 11 Church Walk, Penn Fields, Wolverhampton, Britujo.

Poŝtmarkojn deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj s-ro Dieter Kremp, Kastellstr. 17, D-7500 Karlsruhe 41, FR Germanio.

"Verda Ĝardeno" — modesta aprila renkontiĝo ĉe ĉiujara hejmĝardena ekspozicio en Helsinko. Venu por interŝanĝi spertojn pri ĝardenemo kaj Esperanto! Skribu al s-ro Pentti Törmälä, Kirkkokatu 9, SF-06100 Porvoo, Finnlando; s-ro Seppo Pietiläinen, Metsästäjänkatu 28, SF-06100 Porvoo, Finnlando.

Tolerema paro serĉas kontaktojn kun aliaj toleremaj paroj. Skribu al s-ino Monique Mabru, 70 bis Avenue Claussat, F-63400 Chamalières, Francio.

KSM *Koresponda Servo Mondskala de UEA*

Multaj irananoj atendas korespondantojn, ĉefe el okcidenta Eŭropo. Ni bezonas multajn korespondemulojn, precipe junulojn el ekz. Francio, FR Germanio, Skandinavio, Japanio. Enskribiĝu ĉe: KSM, ĉe R. Llorens, "Les Hortensias 2", 121 bis, Bvd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Se interesas vin variaj mondnovaĵoj, al vi certe plaĉos

HEROLDO DE ESPERANTO

16 numeroj jare. Jarabono kostas 37 gld., pagebla al konto snrl-v, se vi havas konton ĉe UEA, kaj sendu la duan folion de la ĝirilo al Eldonejo kaj Librejo Sonorilo. Se vi havas poŝtĉekkonton, pagu la sumon al poŝtĉekkonto 000-0152140-44 (Bruselo) de Eldonejo kaj Librejo SONORILO.

Ekde la komenco Eldonejo kaj Librejo SONORILO provis havi la plej malaltajn prezojn kaj tio ankoraŭ validas nun. Se vi ne kredas nin, vi povas kompari niajn prezojn kun aliaj kaj vi spertos, ke ni pravas. Do mendu ĉe: Eldonejo kaj Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio; ☎ (03) 827 24 05, internacie ☎ (32 3) 827 24 05.

Eldonejo Gabrielli

Karaj geamikoj!

Kiel vi scias, mi edziniĝis en Parizo la 22an de junio 1984.

Mia edzo, samideano Maksimilien Trenner, al mi rekomendis reorganizi mian libroservon.

Kelkaj eldonaĵoj estas jam elĉerpitaj, sed estas ankaŭ aliaj kiuj atendas legontojn.

Pro tio mi vin petas *mendi* almenaŭ unu el ili. Petu la katalogon!

Se vi mendos dum la daŭro de unu monato post lego de ĉi tiu reklamo, vi ne pagos la sendokostojn.

Kun mia korega saluto, via

d-rino Lina Trenner Gabrielli
166 avenue Daumesnil
F-75012 Paris 12
☎ (1) 343 37 68

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

kontakto

legenda
leginda

Pli kaj pli da homoj aliĝas al la leg-ondo ĉe *Kontakto*. Abonu ĝin nun!

Abonu al

internacia lerneja revuo aperas trifoje jare

juna amiko

24 paĝoj, dukolora preso, ilustrita

Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio.
Redaktas: Oldřich Kníchal
(Patkó u. 3.II.19, H-2040 Budaŏrs, Hungario).

juna amiko uzas lingvaĵon kompreneblan al ĉiu komencanto.
juna amiko konatigas kun diversaj landoj kaj popoloj pere de rakontoj, poemoj, kantoj kaj interesaĵoj.
juna amiko instruas kaj amuzas per facilaj tekstoj.

Abonoj: en la socialismaj landoj ĉe la respektiva landa asocio aŭ ĉe la poŝto, en aliaj landoj ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Prezo: 5,70 gld.

Krimo kun laŭdoj

Jaĥto veturas for... kaj veturigas la **morton**

"Jaĥto veturas for...", nova krimromano de Deck Dorval, sukcesis en kelkaj monatoj rikolti laŭdajn recenzojn ĉie en la Esperanto-literaturo:

- Kia krimromano! Rapidpafa rakontado per vigla lingvaĵo (Esperanto)
- Bela riĉigo de nia propra literaturo romana (Dialogo)
- Agatha Christie revenis sub nova pseŭdonimo! (Franca Esperantisto)

Eldonis: Flandra Esperanto-Ligo, 1984, 192p. Mendu ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte de la eldonejo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Prezo: 25,20 gld.

71a UNIVERSALA KONGRESO

Pekino, Ĉinio, 26 julio - 2 aŭgusto 1986

Plia favora tarifo, valida ĝis la 15a de aŭgusto 1985!

Jam kvincento da aliĝoj venis laŭ la escepte favora tarifo, kiu validis ĝis la fino de 1984. La Estraro de UEA nun fiksis novan tarifon, kiu estas sub la tarifo de la unua kotizperiodo, kiu validos ekde la 16a de aŭgusto 1985. Ĝis tiu dato la kotizoj estas:

Kat. 1	(ne membro de UEA)	150 gld
Kat. 2	(individua membro de UEA)	120 gld
Kat. 3	(kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA)	90 gld
Kat. 4	(kunulo/junulo/handikapulo, kiu ja estas membro de UEA)	60 gld

GEOLOGIO

volumo 5

*** 17 studoj de diverslandaj fakuloj**
*** mapoj, figuroj, grafikaĵoj kaj tabeloj**
*** 172 paĝoj, kun 83 paĝoj da fakaj anoncoj**
*** suplementa faka tabelaro**

Redaktis Endre Dudich. Eldonis Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto, 1984. 21 cm. ISBN 963 571 123 9. Prezo: 9,00 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.



Ĵus aperis

Diskriminacio

prelegoj kaj komentarioj

ĝi traktas

- la radikojn de diskriminacio
- diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj
- internacian ekonomian diskriminacion
- diskriminacion kontraŭ virinoj
- diskriminacion pro seksa orientiĝo
- diskriminacion pro religio
- maldiskriminacion
- lingvan diskriminacion

Kontribuis John Wells (Britio), Werner Bormann (FR Germanio), Uwe Moritz (FR Germanio), Anna Brennan (Italio), Ĵila Sadigi (Irano), Albert Goodheir (Britio), Zeng Heyao (Ĉinio), Umeda Yosimi (Japanio), Nikolai Zhubkov (Sovetunio) kaj aliaj.

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan diskriminacion. *Diskriminacio* diskutigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj kaj donas proponojn por agado i.a. en klubvesperoj.

Diskriminacio havas avangardan grafikan aspekton, kun nigra kaj ruĝa kovrilo, speciale desegnita de Peter Oliver. Rotterdam: UEA, 1984. 175 paĝoj, formato A5. ISBN 92 9017 031 X. Prezo: 21,00 gld. plus sendokostoj (rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj). Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.